

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

6

1993

中國新道

EL POPOLA


ĈINIO





Pentrado en taja vilaço

Foto de LIU SIGONG





Birdo

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

La rubriko "Laŭ Antikva Vojo al Tibeto" finiĝis en la lasta numero. En ĝi ni publikigis 18 artikolojn kaj pli ol 90 fotojn kaj detale konigis la amikajn rilatojn inter Tangdinastio (618-907) kaj Tuboregno. Kun la disvolviĝo de la historio, en la 13-a jarcento

Tubo fariĝis parto de Yuanimperio (1206-1368). La historio montras, ke la teritorio de la hodiaŭa Tibeto estas tiu de la antikva Tubo. Atentemaj legantoj ne malfacile trovas, ke la historiaj atestoj pruvis: en frua tempo Tibeto estis parto de Ĉinio. La artikoloj en la rubriko "Laŭ Antikva Vojo al Tibeto" estis skribitaj de sin-

lorino Wang Xian, kiu faris longan penigan vojaĝon laŭ la antikva vojo kaj bone konis la pejzaĝojn, historiajn restaĵojn kaj popolajn morojn de la loko. Tio, kion ŝi skribis, estas ŝiaj travivaĵoj, kiuj ĝuigis niajn legantojn. Litova leganto G. Antanas en la letero diris al ni: "Al mi plaĉis tradicia artikolo en la rubriko 'Laŭ Antikva Vojo al Tibeto', precipe interesege priskribo de la Flava Rivero kaj la foto, kiu prezentas la marĉejon ĉe la fonto de la Flava Rivero, devus esti plej interesa nunjara fotografaĵo."

Ekde ĉi tiu numero la rubriko "Verdigo en Ĉinio" anstataŭas "Laŭ Antikva Vojo al Tibeto". Media protekto estas zorgata de diversaj landoj kaj ĝin serioze atentigas ankaŭ la ĉina registaro. Ni aperigos ses artikolojn en la rubriko "Verdigo en Ĉinio" por konigi, kiel ĉinoj traktas teron, sablon kaj akvon, kiel ili verdigas urbojn kaj beligas la medion de entreprenoj. Niaj legantoj legu tiujn artikolojn kaj skribu al ni siajn impresojn kaj opiniojn pri ili.

Nun Pekino klopodas gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000. La malfermita Ĉinio esperas okazaĵon de Olimpiaj Ludoj en Pekino. Por esprimi la komunan deziron de la ĉina popolo, ni starigis en tiu ĉi numero la rubrikon "Pekino kaj Olimpi-koj en 2000", aperigos kelkajn artikolojn kaj fotojn por prezenti avangardajn sportejojn, telekomunikajn instalaĵojn, modernan trafikon kaj belan medion de Pekino. Ni kredas, ke tio helpos niajn legantojn pli bone koni Pekinon kaj ili subtenos la peton de Pekino gastigi la Olimpiajn Ludojn.


La Red.

ENHAVO

- 6 **Grena merkato en Ĉinio**
- 26 **REFORMADO:**
Laŭpeca ter-ekspluato sur la ĉina ĉeftero
- 8 **Pekinanoj vivu en pura medio**
- 44 **VERDIGO EN ĈINIO:**
Verdigi Ĉinion
- 30 Sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio al modernigo
- 40 **HISTORIA MISTERO:**
Kie kuŝas la tomboj de imperiestroj de Yuan-dinastio?
- 51 **PEKINO KAJ OLIMPIKOJ EN 2000:**
Espero kaj malfacilo estas kune
- 11 Zhang Yimou, elstara talentulo de la ĉina filmista rondo
- 27 **ARTOJ DE ĈINIO:**
Portretisto Dong Chensheng
- 34 Qu Lingjun kaj lia papera drakoŝipo
- 50 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 20 **La nova vivo de iuj ĉinaj kamparanoj**
- 35 Narsa vivas feliĉan vivon
- 23 **MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ:**
La Drakboata Festo
- 42 **ITINERO PROPONITA:**
Sur la stepo de Interna Mongolio
- 43 **AMUZOJ**
- 48 **KURANTAJ AFEROJ**
- 19 Verda tago memorinda
- 14 Valencio atendas kun malfermaj brakoj
- 15 Karmemore al Juan Régulo Pérez
- 16 Disfloru la spirito de Stafeto!
- 38 Kunikloj tre plaĉas ĉinojn
- 17 **POR KOMENCANTOJ:**
Bona loko por turistoj
- 18 **ESP-NOVAĴOJ**
- 4 **INTER NI**
SUR LA KOVRILO:
Porceremoniaj knabinoj
- Foto de **Liu Sigong**
- 2 Pentrado en taja vilaĝo
- 4 Birdo
- 36 Kuriozaj konstruaĵoj en Ningxia
- 32 En infanĝardeno
- 53 Renkonte al nova epoko de vid-telefona komunikado

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Henan-provinco (p. 44)
2. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (p. 42)
3. Miluo-gubernio (p. 23)
4. Baoji (p. 6)



Grena merkato en Ĉinio

de ZHUANG CHU

EN 1992 grena merkato aperis en 400 gubernioj de 7 provincoj, Ĉinio, kio markis, ke Ĉinio komencis grandinfluan kaj signifoplenan reformadon en la kampo de la grena cirkulado.

NEPRA VOJO

Greno estas gravega, ĉar ĝi havas striktan rilaton kun ĉiuj loĝantoj, tial ĉiuj registaroj, ĉu ĉinaj, ĉu alilandaj, ĉu nunaj, ĉu historiaj, senescepte dediĉas grandan atenton al la grena problemo. En la pasintaj jardekoj en Ĉinio konstante mankis greno, kio devigis la ĉinan registaron monopoligi la grenan aĉetadon kaj vendadon

por garantii la fundamentan grenan provizon al siaj popoloj.

Post ekpraktiko de la por-domalferma kaj reforma politiko Ĉinio altigis la aĉetprezon de greno, kaj dank' al la praktiko de la laŭkontrakta produkta respondeca sistemo, la produkta aktiveco de la ĉinaj kamparanoj multe levigis kaj plie oni aplikas sciencajn metodojn en la terkulturado, ĉio ĉi akcelis disvolviĝon de la grena produktado. En 1979-1984 la totala grena produktokvanto de Ĉinio kreskis de 300 milionoj da tunoj al 400 milionoj da tunoj kaj fundamente solvigis la problemo pri manĝado en Ĉinio.


Pro pliiĝo de greno, la monopola sistemo de greno praktikata de la registaro fariĝis pli kaj pli netaŭga kaj neharmonia kun disvolviĝo de la produktaj fortoj. Unuflanke la registaro daŭre rigardas grenon kiel socian garantiataĵon kaj vendas grenon al la urbanoj je malalta prezo kaj aliflanke per grandaj sumoj aĉetas grenon de la kamparanoj. Ofte okazis, ke ju pli multe la ŝtato aĉetis grenon, des pli multe ĝi devis stipendii. Sole en 1991, pro la prezdifereco la deficito de la grenaj entreprenoj de la tuta lando estis 50 miliardoj da juanoj, kiuj konsistigis 1/6 de la tutlanda financa budĝeto.

Greno nepre devas esti komercaĵo. Ĝiaj produktado kaj administrado nepre devas esti deciditaj de la merkata bezono — jen la ĝusta vojo por reformi la produktadon kaj administradon de greno kaj unika vojo por eliri el la embaraso por Ĉinio.

SERIOZE KAJ PRUDENTE

Jam en 1984 Ĉinio unuafoje havis malfacilon en grenvendado. En la socio aŭdigis voĉo pri liberigo de grena prezo. En Ĉinio la grena problemo estas gravega. Por solvi ĝin oni devas esti tre serioza. La registaro unue liberigis la prezojn de viando, ovo, lakto kaj iuj aliaj flankokupaj produktaĵoj kaj aĉetas kaj vendas certan kvanton

Subĉiela grenejo en la antaŭurbo de Xiangfan



da greno laŭ la kontrakto kaj samtempe permesas certan kvanton da greno vendi sur la merkato.

La principo paŝo post paŝo enkonduki grenon sur la merkaton evitigis la merkatan ĥaoson. En 1992, surbaze de tio, ke Ĉinio jam havis riĉajn rikoltojn en la sinsekvaj jaroj kaj la grena rezervo de la ŝtato kaj tiu en la kamparanaj familioj estis kompare abundaj, la registaro decidis funkciigi grenan merkaton unue en 400 gubernioj de 7 provincoj kaj poste laŭeble funkciigi ĝin en ĉiuj aliaj lokoj en la venontaj 2-3 jaroj.

UNUAPAŜA SUKCESO

Ĉinio liberigis la grenan prezon iom post iom en la kondiĉoj, ke livero de greno estas pli granda ol ĝia bezono, tial post la prezolibrigo, la merkato en la tuta lando ĝenerale estis stabila. La reformado de la grena prezo rikoltis bonan frukton. Tion ekzemplas Xiangfan, la dua granda urbo en la provinco Hubei.

Xiangfan liberigis la grenan prezon kaj ĉesigis cirkuladon de la grenkupono en septembro 1992. Antaŭ tio la urbo jam dufoje levis la grenan prezon. Eble pro tio la kompleta liberigo de la grena prezo ne kaŭzis maltrankvilon ĉe la loĝantoj kaj antaŭ la grenvendejoj ne vidiĝis longa vico de aĉetantoj. Ne altiĝis la prezoj de la tieaj popularaj manĝaĵoj. Iu juna kliento diris: "Nun la prezo de la ŝtataj grenvendejoj estas preskaŭ sama kiel tiu sur la bazaru. Ni povas aĉeti en ĉiu ajn vendejo kaj plie la registaro donas al ni kelkajn juanojn kiel subvencion. Ni neniom sentas maltrankvilon."

Liberiginte la grenan prezon, la ŝtato ne plu kontraktis kun kamparanoj pri grenaĉetado kaj nuligis avantaĝon en provizado de kemia sterko kaj mazuto al la kamparanoj, kiuj plenumis la taskon vendi grenon kaj kotonon al la ŝtato, nuligis ankaŭ la subvencion al la grenaj entreprenoj. Pro

ĉio ĉi la financa ŝarĝo de la ŝtato multe malpliigis.

Kiam Ĉinio monopoligis la grenan aĉetadon kaj vendadon, la grenvendejoj laboris neaktive, ili nur atendis la aĉetantojn kaj kiam ili ne ĝustatempe ricevis la financan subvencion de la ŝtato, multaj el ili suferis de deficino. Post liberigo de la grena prezo, la grenaj entreprenoj vigliĝis kaj ne plu havis novajn deficinojn. Ili funkciigas diversajn ekonomiajn entreprenadojn, prilaboras grenon kaj faras preparitajn manĝaĵojn por vendi. Tio ne nur oportunas al la klientoj, sed ankaŭ pliigas la enspezon de la entreprenoj mem.

Liberigo de la grena prezo akcelis perfektigon de la grena merkato. Nun la grena prezo formita en la sistemo de la normaligita merkato en la urbo Zhengzhou, la plej granda pogranda grena foiro en Ĉinio, nun ludas gravan rolon por la kurza ŝanĝigo en la tutlanda grena vendado, kio jam vekis atenton en kaj ekster la lando kaj akcelis cirkuladon kaj kunlaboron de la internacia ekonomio. La negoco de greno kaj oleo farata de la supre menciita foiro estas utila por malpliigi la prezan malsekurecon en la kontanta negoco. Tio ofte vidigas la tendencon de la kurza ŝanĝigo. Nun en Ĉinio troviĝas pli ol dek ŝtataj kaj provincaj pogranda grenaj foiroj. Fondiĝis ankaŭ dekoj da tiaj foiroj funkciigataj de la grenaj departementoj de la urboj kaj gubernioj. Krome, funkcias ankaŭ 80 000 grenoleaj foiroj en la ĉina kamparo. Ili ĉiuj donis ŝancon pluapaŝe liberigi la grenan prezon. Formiĝis ankaŭ la konserva sistemo de greno kaj oleo. La kvanto de la konservata greno por apartaj uzoj de la ŝtato jam atingis la deziratan ĝeneralan normon, dum la grena konservo en la provincaj niveloj atingis 2.5 miliardojn da kg.

Liberigo de la grena prezo akcelis ankaŭ reguligon de la konsisto de la kulturataj plantoj en la

kamparo. Guangdong-provinco kompare frue liberigis la grenan prezon. Sub la premisoj de la senĉesa leviĝo de la totala produktokvanto de greno la tieaj kamparanoj pliigis la areon de bonkvalita rizo, kies produktokvanto tamen estas malgranda. Dank' al ilia zorgema kultivado kaj apliko de novaj scienc-teknikaj fruktoj la meznombra hektara produktokvanto de la bonkvalita rizo superis 6 tunojn. En Guangdong-provinco oni starigis 5 000 agrikulturajn altproduktajn bazojn. Nun pli ol 800 000 kamparanoj energie laboras sur la kampo de cirkulado de agrikulturaj produktaĵoj. En 1992 la pokapa jara enspezo de la kamparanoj de la provinco atingis 1 143 juanojn.

Kompreneble, liberigo de la grena prezo alportis ne sole bonon. Aperis jam nova problemo. En iuj lokoj oni nuligis la subvencion al ŝtatprezaj kemia sterko kaj mazuto, kio levis la produktokoston de la terkulturaĵoj. Pro la prezaltiĝo de la produktaj materialoj kaj kurzfalo de greno, enspezo de la kamparanoj ne pliigis kaj ie eĉ malpliigis.

Koncernaj fakuloj opinias, ke kvankam aperis iuj novaj kontraŭdiroj en la ŝanĝigo de la malnova sistemo, tamen la plej grava estas, ke la 900 milionoj da ĉinaj kamparanoj eniris la merkaton kaj fariĝis veraj produktantoj kaj entreprenantoj de varoj. Antaŭ 14 jaroj, kiam oni ekpraktikis la laŭkontraktan respondecan produktan sistemon en la kamparo, la kamparanoj sin liberigis el la kateno de la malnova sistemo, vekigis ilia produkta aktiveco, kio turnis la radojn de la ekonomia reformado de Ĉinio. Nun la reformado kun grena prezo kiel la kerno en la ĉina kamparo enkondukas la ĉinajn kamparanojn en la pli vastan mondon. Ĝi certe ŝanĝos la produktajn metodojn kaj ideologiajn konceptojn de la kamparanoj kaj rapidigos la evoluon de la historio de la reformado en la tuta Ĉinio. ■

Pekinanoj vivu en

Teksto de GU JIACHENG

Fotoj de WU XINHUA


EN la malnova Pekino estis preskaŭ neniuj granda industria entrepreno. Tiam oni ja nomis ĝin griza urbo pro ĝiaj grizaj muroj, tegoloj, stratoj kaj nebula ĉielo en la fono de grizaj konstruaĵoj. Kun transiro de la konsumata urbo al la industria, Pekino fariĝis vere griza. La serioza polucio minacis ĝian ekologian medion.

Tiutempe mia amiko, kiu flugis al Pekino, diris al mi, ke rigardate de sur la ĉielo ŝajne la urbo malaperis de la tero. Tio kompreneble estis iom troigita, tamen estis certe, ke en Pekino regis griza nebulo. Fakte, plej ĉagrenis la pekinanojn ne nebulo, sed printempa ventego. Kiam furiozis vento, fariĝis tute mallume kaj flugis sableroj tien kaj reen. Tiam ĉiuj pasantoj havis sur si tavolon da sablo, kiu eĉ enbloviĝis en iliajn harojn, buŝojn kaj nazojn.

Subigi sabloventon kaj malhelpi la atmosferan polucion estis urĝa afero por Pekino. Por tiu celo, de post la 70-aj jaroj oni alprenis serion da paŝoj kaj akiris sukceson.

Karbo brulanta, gaso ellasita de aŭtoj kaj eluzita

gaso de fabrikoj kaŭzas la atmosferan polucion de Pekino. Tial, por plibonigi la kvaliton de la atmosfero estas plej grave ŝanĝi la strukturon de hejtado. En Pekino estas alprenitaj rimedoj, kiaj anstataŭigo kaj reformado de malnovaj fornoj, plimultigo de senfuma hejtado, unuigita varmprovizo, malpliigo de fulgokarbo kaj grandarea verdigo. Post 1981 jam finiĝis granda konstruado por konduki en la urbajn kvartalojn de Pekino gason el la Ĉefurba Fer-stala Kompanio kaj Pekina Koaksiga Fabriko kaj naturan gason el la Nord-Ĉinia Petrolkampo, rezulte de tio 1.84 milionoj da familioj uzas likvigitan aŭ naturan gason kaj la centra hejtado kovris 50 milionojn da kvadrataj metroj. Alia grava mediprotekta konstruo estas la Varmoproviza Projekto de la Termoelektraj Shijingshan (Ŝiĝingŝan), kiu ekkonstruiĝis en la unua duono de 1992 per la mono kredite ricevita ĉe la Monda Banko. La tuboj longas 21 km kaj la varmprovizo ampleksos 10 milionojn da kvadrataj metroj. Dank' al ĝia funkciigo la polucio kaŭzita de multaj hejtfornoj reduktiĝos kaj la popola vivo faciligos.



Kontrolo de vostgaso de aŭto

pura medio

Por batali kontraŭ sablovento en Pekino disvolviĝis tutpopola forstumado. Dank' al penado en 15 jaroj, jam formiĝis ŝirma forsta zono de Pekino. La kojnoforma verdejo etendiĝas de la antaŭurbo ĝis la urbocentro. La ŝirma forsto, kojnoforma verdejo kaj verda borderaĵo ambaŭflanke de riveroj, stratoj kaj ŝoseoj formis reton de verdaĵo. La 16 grandaj forstoj kaj ĉiuj strioj da verdaĵoj ŝirmas Pekinon kontraŭ sablovento. Laŭ statistiko farita antaŭ nelonge, la polvo en la aero en la urbaj kvartaloj de Pekino reduktiĝis je 30%, kompare kun tiu en 1981, kaj la totala kvanto de polvo ŝvebanta en la aero rimarkinde malgrandiĝis; sulfura dioksido, karbona monoksido kaj nitrogena kombinaĵo entenataj en la aero dum la tagoj de nehejtado malsuperis la normon difinitan de la ŝtato. Sekve de tio, Pekino estas honorita per la titolo "Verdigita Urbo sur Ebenaĵo — Antaŭiranto de Forstumado". Laŭ statistiko, la averaĝa vivdaŭro de la pekinanoj estas ĉ. 75.7 jaroj, je 3.8 jaroj pli longa ol tiu en 1981, dum la mortokvanto malkreskis al 0.05%. Per tio Pekino enviciĝis inter la grandaj urboj de la mondo kun malgranda mortokvanto. Sendube, unu el la gravaj kaŭzoj kuŝas en plibonigo de la medio.

Protekti kaj bonigi la medion estas granda sinteza konstruado. En la malnova Pekino ĉie vidiĝis kabanoj, sed nun arbore staras altaj domoj. En la pasintaj jaroj aperis en Pekino multaj plansetlejoj. Ĝeneral-dire, oni arbarumis ilin tuj post ilia finkonstruiĝo, tiel ke la loĝantoj vivas en bela medio. En Pekino kuŝas la lageto Shichahai ĉirkaŭita de loĝdomoj. Antaŭe tie estis kvietaj promenejoj kaj bela naĝejo, sed poste, oni prenis la lokon kiel tenejon, disfalis la bordo en pluraj lokoj. En 1984 la magistrato mobilizis laborfortojn por forigi la ŝlimon, pavimis ĉirkaŭlagan vojon, plantis arbojn kaj florojn ĉe la lago. Nun tie, frumatene, multaj kuretas kaj faras tajĝiĉjŭan-ekzercadon; kaj tage teatroamantoj sin amuzas per kantado de pekina opero. Krome, klariĝis la akvo de la riveroj, kiuj trafluas Pekinon. Ili kun ombroriĉaj arboj kaj imponaj domegoj formis belajn pejzaĝojn.


Dum longa tempo en la pasinteco la loĝantoj de Pekino trinkis subteran akvon. De 1985 iuj pekianoj prenas trinkakvon el tri grandaj akvokonservejoj

proksime de Pekino. Por teni la akvon pura, la magistrato difinis la akvokonservejojn kiel neturismajn lokojn kaj malpermesas naĝi kaj remi tie. Krome, ĝi alprenis ankaŭ aliajn rimedojn por la sama celo, kiel ekzemple, bloki la digojn en la periodo de inundo kaj limigi enretan fiŝbredadon; fermi poluantajn entreprenojn kaj kulturaj akvofonto-protektajn arbojn en la supraj basenoj kaj protektaj zonoj de la akvofontoj; difini la sferon por protekti la putojn de subtera akvo kaj forigi 120 poluantajn fontojn. Nun grandaj vorkoj de media protekto estas konstruataj en Pekino. Unu el ili estas traktejo de malpura akvo en suda Pekino. Antaŭ nelonge finiĝis la konstruado de ĝia ĉefa parto. Post finiĝo de la vorkoj fine de 1993, la taga kvanto de traktita malpura akvo atingos milionon da tunoj.

Por plibonigi la medion necesas ankaŭ malhelpi bruon, trakti forĵetaĵojn kaj bone teni la agrikulturan ekologion. En la pasintaj 15 jaroj en Pekino estis ordigitaj 1 000 brufontoj, translokitaj 200 bruegaj fabrikoj kaj finkonstruitaj 28 plansetlejoj kompare kvietaj. Dank' al tio, rimarkinde pliboniĝis la medio de 10 000 familioj. La vilaĝo Liuminying en la ĉirkaŭurbo akiris certan sukceson en la ekologia agrikulturo kaj nun ĝi sin turnas al entreprenado de ĝardenistika agrikulturo. Tion laŭdis oficisto de la Media Programo de UN. Dank' al disvolviĝo de la ekologia agrikulturo oni povas ne nur liveri nepoluitajn agrikulturajn produktaĵojn, sed ankaŭ plibonigi la medion de Pekino.


De post 1981 Pekino elspezis 1.5 miliardojn da juanoj por forigi polucion kaj 25 miliardojn da juanoj por konstrui vojojn kaj instalaĵojn por provizi per gaso, varmo kaj akvo. En Pekino estas pli ol 8 000 profesiaj mediprotektistoj. Tie fundamente formiĝis la sistemo de media administrado kaj la reto de scienc-esploristoj kaj observantoj. Ĉiujare la mediprotektaj departementoj akiras grandan nombron da datenoj pri atmosfero, tersurfaca akvo, bruo, estaĵo, grundo kaj natura ekologio, ĝustatempe konas la kvaliton de la medio kaj la forigadon de poluantaj fontoj kaj donas fidindajn bazojn kaj bonan servon al la media administrado kaj ellaborado de necesaj leĝoj. Ankaŭ fabrikoj, minejoj kaj establaĵoj de akvomastumado, agrikulturo kaj trafiko havas sian propran sistemon de media observado por bone fari median protekton. En la lastaj jaroj pekianoj mediprotektaj fakuloj kunlaboris kun alilandaj kolegoj.

Kompreneble, la media protektado de Pekino havas siajn mankojn. Ekz., ŝvebas en la aero kompare multa polvo; vintre pro hejtado la sulfura dioksido entenata en la aero foje kaj foje superas la difinitan normon; ĉe vojkruciĝoj de ĉefaj stratoj estas serioza polucio de gaso ellasita de aŭtoj. Kontraŭ ĉio ĉi oni alprenis necesajn rimedojn. La pekinanoj faras penadon kun plena memfido por havi pli klaran ĉielon, puran akvon kaj verdan teron. En la proksima estonteco la pli pura kaj pli bela medio prezentiĝos antaŭ la okuloj de la malproksimaj gastoj. ■



Kanalo kondukanta akvon el Miyun-akvokonservejo

Foto de ZHAO CHENGYI



Matena korpoekzercado


Medipurigaj aŭtoj



Zhang Yimou, el- stara talentulo de la ĉina filmista rondo

Teksto de JIAN GUO

Fotoj de PU LI



Zhang Yimou antaŭ kamerao

Zhang Yimou (maldekstre) donas konsilon al aktorino.



ZHANG Yimou (Ĝang Jimoŭ), kiel plej romantika persono en la filmista rondo de Ĉinio, estas unu el la malmultaj ĉinaj reĝisoroj, kiuj ĝuas reputacion en la filmista rondo de la mondo. Antaŭ ne longe, kiam lia nova filmo "Akuzado de Qiuju (Ĉiŭĝju)" projekciĝis, estis prezentitaj ankaŭ la de li reĝisoritaj kaj de ĉefrolulino Gong Li luditaj filmoj "Judou (Ĝjudoŭ)" kaj "Pendulo de la Ruĝa Lanterno", kiuj estis premiitaj internacie. La filmoj faris sensacion en Ĉinio kaj la nomo de Zhang Yimou komunikiĝis de buŝo al buŝo.

"AKUZADO DE QIUJU"

La filmo "Akuzado de Qiuju", kiu ricevis la premion Ora Leono en la Venecia Filmo-festivalo de Italio, estas rigardata kiel alia trarompo en la arta kariero de Zhang Yimou. La filmo priskribas, ke post kiam la edzo de la kamparanino Qiuju en nordokcidenta Ĉinio estis piedbate vundita de la vilaĝestro, ŝi akuzis lin en la juĝejoj de ŝjang-o (ĉina administra unuo sub gubernio aŭ distrikto) ĝis urbo. Per tio la filmo prezentas, ke la ĉinaj kamparaninoj jam havas modernajn konceptojn en la reformo kaj pordomalfermo, tamen ili estas neeviteble limigitaj de tradiciaj konscioj. Anstataŭ peni por skizi bildojn, nuanci kolorojn kaj intensigi simbolecon, Zhang Yimou prenis senafektan kaj delikatan manieron por prezenti ordinarajn kamparanojn.

Zhang Yimou opinias, ke la obstina karaktero de Qiuju, sincera amikeco inter ĉinaj kamparanoj kaj intimaj rilatoj inter vilaĝanoj, ĉio venas el la ordinara vivo de ordinaraj popolanoj. "En kia ajn okazo ĉinaj popolanoj estas plej bonkoraj kaj plej amindaj. Mi amas ilin kaj reĝisoris tiun ĉi filmon por ili," li diris.

Por krei fortan efikon kaj vivetoson, la filmo prenis aŭten-

tikajn vidaĵojn kiel siajn planojn, inter kiuj 50% estis faritaj per kaŝa fotado. Krom 4 ĉefroluloj, ĉiuj aliaj roloj de la filmo estas ludataj de lokaj kamparanoj kaj filmitaj nerimarkite.

KRESKADO EN MALFACILAJ CIRKONSTANCOJ

Zhang Yimou ricevis severan edukon de siaj gepatroj en la infaneco. Lia patro estis intelektulo irinta malfacilajn vojojn. Tio tamen kulturis en li la persistemon kaj obstinecon. Fininte la lernadon en mezlernejo, li iris labori en la kamparo, same kiel aliaj junuloj dum la kultura revolucio. En la kamparo li estis ŝatata de la kamparanoj pro sia eltenemo al penigaj laboroj.

Foje, li estis varbita kiel laboristo de la 8-a Nacia Kointeksa Fabriko de Xianyang (Ŝjanjang) pro tio, ke li scipovis ludi korbopilkon. Tiam li estis sorĉita de fotado. Li preferis labori nokte por havi tempon tage fari fotadon per la fotilo, kiun li aĉetis per sia ŝparmono. Krome, li aĉetis ankaŭ rivelaparaton kaj aranĝis simplan kameron en la amasloĝejo. La malparolema Zhang Yimou ofte laboris longe en sia "reĝlando".

Poste, iu diris al Zhang Yimou, ke lia fotografio estas sufiĉe alta kaj li devas partopreni en ekzameno por eniri fotografian fakultaton de filmo-instituto. Kun siaj verkoj li iris al la Pekina Filmo-Instituto. Oni varme akceptis lin, tamen diris al li: "Vere bonaj estas viaj fotoĵoj kaj viaj artsentoj. Nia instituto bezonas tiajn lernantojn, kia vi. Sed laŭ la difino, la ekzamenantoj devas ne superi la aĝon de 25 jaroj, sed vi aĝas jam 27 jarojn."

Malespera, Zhang Yimou informiĝis, ke s-ro Huang Zhen (Hŭang Ĝen), estro de la Kultura Ministerio, alte taksas tal-

entulojn, eble li povos doni helpon. Li senprokraste turnis sin al Huang. Dank' al la rekomendo de Huang Zhen, en 1978, Zhang Yimou eniris en la filmo-instituton sen ekzameno.

Post la diplomitiĝo el la instituto, Zhang Yimou kaj liaj kunlernantoj estis senditaj labori en la Guangxi(Gŭangsj)-a Filmo-studio. Por tiu malgranda studio, al kiu mankis kapabluloj, ili estis trezoro. Oni tuj donis al ili la taskon fari filmadon. Nun kaptinte la ŝancon, ili filmadis kun granda entuziasmo kaj sukcesis en produktado de la filmo "Unu kaj Ok Homoj", kies kameraisto estis Zhang Yimou kaj kiu vekis grandan atenton de la ĉina filmista rondo.

SENSACIADO EN LA FILMISTA RONDO

En la ĉina filmista rondo multaj homoj scipovas kameradon, ludadon kaj reĝisoradon. Tamen, estas tre malmultaj tiaj homoj, kia Zhang Yimou, kiu estas tre lerta en la menciitaj flankoj kaj kies filmoj premiitaj en internaciaj filmaj festivaloj.

En 1985, en Ĉinio, vekis vastan diskuton la filmo "La Leŭsa Tero" reĝisorita de Chen Kaige. Ĝia kameraisto estis Zhang Yimou. Samjare, la filmo ricevis premion de plej bona filmado en la 5-a Ĉina Filmo-festivalo Ora Koko, la Nantesa Azio-Afriko-Latin-Amerka Filmo-festivalo de Francio kaj la Havaja Internacia Filmo-festivalo de Usono. En 1986, Chen Kaige reĝisoris la filmon "La Granda Parado" kaj refoje invitis Zhang kiel kameraiston. Tiu ĉi filmo ricevis la Specialan Premion de la Juĝkomitato en la Montreala Internacia Filmo-festivalo de Kanado.

Zhang Yimou neatendite fariĝis la ĉefrolulo de la filmo "La Malnova Puto". Pro ĝi li gajnis la premion de plej bona ĉefrolulo en la 11-a Ĉina Filmo-festivalo Cent Floroj, 8-a Ĉina Filmo-festivalo Ora Koko kaj la 1-a Tokia Internacia Filmo-



Zhang Yimou (dekstre) kaj Gong Li premiitaj en la Venecia Filmo-festivalo de Italio en 1992

festivalo okazinta en oktobro de 1987.

Tamen li ne kontentis pri sia sukceso. Li reĝisoris la novan filmon "Ruĝaj Sorgoj" post "La Malnova Puto". "Ruĝaj Sorgoj" gajnis premion de plej bona rakontfilmo en ĉiuj 3 Ĉinaj Filmo-festivaloj. Krom la premio Ora Urso por la 38-a Internacia Filmo-festivalo de Okcidenta Berlino, "Ruĝaj Sorgoj" gajnis ankaŭ 8 sinsekvajn premiojn eksterlande.

Post tio Zhang Yimou ludis ĉefrolon en la rakontfilmo "Argila Soldato de Qin-dinastio" kaj reĝisoris la filmojn "Judou", "Pendu Alte la Ruĝa Lanterno" kaj "Akuzado de Qiuju". Eksterlande, pli kaj pli altiĝas la renomo de tiuj filmoj, inter kiuj "Judou" kaj "Pendu Alte la Ruĝa Lanterno" en 2 sinsekvaj jaroj estis aljuĝitaj kiel kandidatoj de plej bona fremdlingva filmo de la

Oskar-orfigura Premio de Usono. Laŭ nekompleta statistiko, la supre menciitaj filmoj 14-foje gajnis premiojn en aliaj landoj kaj regionoj, inkl. de Hongkong.

ZHANG YIMOU EN LA VIVO

Zhang Yimou, kun brosharoj kaj vizaĝo plena de sulkoj, sentigas la afablecon propran al la ĉinaj kamparanoj. La brilantaj okuloj spegulas la profundecon de lia penso.


Antaŭ publiko, Zhang Yimou aspektas serioza, tamen ne aroganta, kiel oni imagas. Li tenas sin modeste kaj pacience, respondante demandojn de ĵurnalistoj. Li ofte ŝercas kun siaj amikoj, humurigante seriozaĵojn, kaj per tio prezentas sian saĝecon.

Zhang Yimou ŝatas porti ĝinzojn, T-ĉemizojn kaj jakojn. Sed kiam li partoprenas solenajn ceremoniojn, li tamen portas eŭropan veston. Kvankam li aspek-

tas vigla en eŭropa vesto, tamen li grumblis: "Mi kvazaŭ perdas memfidon, kiam mi portas ĝin."

Zhang Yimou amas nur filmarton. Se vi parolas kun li pri filmo, li tuj ekĝojas kaj la okuloj ekbrilas. Kiam la temo iom ŝanĝiĝas, li tuj fariĝas distrigema kaj la rigardo apatia.

Kiel kameraisto, Zhang Yimou turnas sian grandan atenton al kolorelekto. Ŝajne, li plej ŝatas ruĝan koloron. La ruĝaj sorgoj en "Ruĝaj Sorgoj", la ruĝa ŝtofo en "Judou", la ruĝaj lanternoj en "Pendu Alte la Ruĝa Lanterno" kaj la ruĝaj paprikoj en "Akuzado de Qiuju" ĉiuj simbolas lian pasion kaj amon al la vivo. Li ne nur ŝatas ruĝan koloron, sed ankaŭ reliefigas ĝin per ruĝa fono en la filmoj. Li plene prezentas sian karakteron sur la ekrano, ke la de li reĝisoritaj filmoj respegulas lian propran stilon. ■



Valencio atendas kun malfermaj brakoj

KIEL prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto, mi sentas grandan plezuron konigi la kongreson kaj kongresurbon Valencio pere de EPC, vaste legata en la Esperanta komunumo.

La nomo Valencio fakte havas trioblan sencón: Valencia Komunumo (Valencilando), Valencia Provinco, Valenciurbo. La mediteranea urbo Valencio kun ĉ. 800 000 loĝantoj situas en la orienta parto de Hispanio kaj estas la ĉefurbo de la Valencia Komunumo, unu el la 17 aŭtonomaj komunumoj de Hispanio, ampleksanta tri provincojn: Valencio, Kasteljono kaj Alakanto.

La urbon fondis romiaj soldatoj en 138 a.K., sed vere grava ĝi fariĝis nur kiel centro de aparta emirlando dum la 8-a jarcento. Maŭra ĝi restis dum plenaj kvin jarcentoj. La sekvajn kvin jarcentojn Valencilando estis subigita al la aragona krono. Post la dinastiaj bataloj komence de la 18-a jarcento kreiĝis hispanaj limoj, kiajn ni hodiaŭ konas, kaj Valencio estis parto de tiu nova, centrisme regata regno. Dum la tragika civila milito (1936-1939) Valencio elstaris kiel ĉefurbo de la respublikana registaro. La vera ekonomia vekigo okazis al Valencio nur post 1960. Nun Valencilando estas konata kiel la plej granda produktanto de nutraĵoj en Hispanio. Plej okulfrapas la kultivado de

rizo kaj oranĝoj. La urbo Valencio ne nur floras per turismo, sed ankaŭ gastigas komercistojn pro sia grandega kaj fama foirejo funkcia dum la tuta jaro.

Kiel antikva urbo, Valencio havas multe da historiaj konstruaĵoj, interalie, plej famas la Turoj de Serano, siaspeca simbolo de la urbo. Tre viglas en Valencio ne nur muzika vivo, pro kiu ĝi ĝuas famon en la tuta Hispanio, sed ankaŭ kultura vivo, kion oni povas konstati el multaj festoj tra la jaro, interalie, plej menciindas la ŝtip-fajra festo okaze de la tago de Sankta Jozefo, en marto. La marborda situo dotis la urbon ne nur per mediteranea klimato kun ne tro varma somero kaj milda vintro, sed ankaŭ per tre ripozigaj plaĝoj kun tipaj restoracioj de valencia gastronomio.

Esperanto estas nedisigebla parto de la valencia historio. La unuan Esperanto-societon oni fondis jam en 1902. En 1909, post UK en Barcelono, Valencion vizitis nia majstro Zamenhof, kiu estis majeste akceptita. En 1934 Valencio gastigis SAT-kongreson. En 1947 ĝuste en Valencio fondiĝis la Hispana Esperanto-Federacio. La loka biblioteko posedas riĉan Esperantlingvan kolekton ĉefe de frutempaj revuoj. Nun en Valencio la iniciatemaj Esperanto-grupoj tre viglas kaj energie laboras por plene sukcesiĝi la ĉi-jaran kongreson.

Unu el la perloj de la moderna arkitekturo de la urbo la Muzika

Palaco estos kongresejo de la 78-a UK. Dum la kongreso oni traktos la temon "Klerigo por la 21-a jarcento" en diversaj manieroj, kiuj inkluzivos prelegojn, forumojn kaj diskutrondojn. La kongreso komenciĝos tre valencieske per giganta paeljo (apartmaniere spicita rizo kun legomoj kaj kokidaĵoj aŭ maraĵoj) por ĉiuj kongresanoj. Ĝi estos ne nur interkona vespero, sed ankaŭ speco de senpaga bankedo por ĉiuj, kaj antaŭ ĉio spektaklo. La kongresa programo estos same enhavoriĉa kaj varia kiel kutime, kaj ĉiu kongresa tago portos iom da surprizoj, lokaj koloroj kaj inspira etoso. Tamen estos io malkutima: oni havos sies-ton tagmezan. Tio donos pli da okazoj ne nur por ĝui bonegajn valenciajn manĝojn kaj vinojn, por promeni en la urbo kaj ripozi, sed ankaŭ por pli efike kongresi.

Paralele kun UK, okazos la 28-a Internacia Infana Kongreseto en Alborache, 40 km okcidente de Valencio.

Estas ofertataj Antaŭkongreso en Barcelono kaj Postkongreso en Madrido kaj tra Andaluzio kaj ferioj en la tristela hotelo Aparthotel Acuasol, tuj apud la urbo Valencio, kiuj celas doni plian ŝancon konatiĝi kun la kongresa lando kaj viziti plej famajn vidindaĵojn.

LKK kaj la tuta hispana esperantistaro varme salutas niajn samideanojn tra la mondo kaj tutkore invitas ilin veni al Valencio, kiu atendas ilin kun malfermaj brakoj. ■

Karmemore al Juan Régulo Pérez

A PENAŬ mi finis mian prelegon pri la estetikaj aspektoj de la ĉina lingvo, al mi iris prof. Juan Régulo Pérez kun varma gratulo. Li montris grandan intereseon por mia prelego kaj la ĉina lingvo. Li eĉ murmuris: "Civilizacio, nekomprenbla kaj admirinda civilizacio en la antikva mondo, lando kun hereda mirinda kulturo kaj juna energio." Hejmenreveninte tuj post la UK, li sendis artikolon pri lingvaj interkontaktoj por la gazeto EPĈ. La artikolo havas eĉ la subtitolon: Dediĉe al Chen Yuan! Mi estis surprizita kaj tre kortuŝita de tiu subtitolo, ĉar mi pensis, ke mi ne meritas tiun grandan honoron. Leginte la artikolon, mi tuj skribis al li kaj dankis lin pro lia afableco, kaj samtempe mi sendis mian artikolon prilaboritan surbaze de la prelego, kiun li petis por la plantotaj plurvolumaj verkoj, eldonotaj de La Laguna Universitato, kie li instruis dum multaj jaroj, por celebri la 70-an datrevenon de sia naskiĝo. La artikolo fariĝis unu ĉapitro de la unua volumo — volumo pri lingvistiko kaj lingvaj problemoj, pri kiuj li okupis sin dum pluraj jaroj. Antaŭ presado de la libro li skribis al mi, ke li korektis nur unu vorton en la artikolo, t.e. anstataŭigi dragonon per drako (la vorton mi misuzis pro la influo de la angla vorto "dragon"), kaj petis mian pardonon. Kia sincera kaj modesta homo!

Preskaŭ 10 jaroj forpasis de

tiam, kiam ni kune veturis al la flughaveno de Vankuvero. Estis la jaro 1984. Tiam li volis flugi hejmen, al Hispanio, kaj mi al Toronto por viziti mian maljunan patron. Ni devis atendi tie preskaŭ du horojn por la destinitaj flugoj. En la kvieta atendejo ni babiladis, trinkante kafon. Ni interparolis interalie pri niaj iritaj vojoj, ĉar li kaj mi jam venis al la vespero de la vivo. Fine li konkludis, kun brilantaj okuloj, ke li trovis sufiĉe multajn similaĵojn inter ni: ni ambaŭ esperantistigis en la komenco de la tridekaj jaroj, ni ambaŭ absorbiĝis en lingvaj sciencoj, fariĝis profesoroj de lingvistiko (li pri antikva hispana filologio kaj mi pri moderna ĉina lingvo kaj sociolingvistiko), ni ambaŭ estas eldonistoj (ni eĉ parolis pri niaj travivaĵoj tiuflanke), kaj ni ambaŭ partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon dum la Dua Mondmilito, kaj ni miris, ke ni ambaŭ eĉ estis perantoj de la tiama hispana kontraŭfaŝisma gazeto "Popola Fronto"! Ĉe la fino li diris kun rideto, ke li estis ĵetita en karceron por kelkaj jaroj, li eĉ fiere asertis, ke nur tio estas unika por li. Mi konfesis, ke mi estis feliĉa, ke mi ne estis en malliberejo dum la vivo, sed tamen mi povas diri, ke mi estis duonmallibera en pluraj jaroj dum la "kultura revolucio", kiu fakte detruis kulturon. Tiam mi nenion faris, ĝustadire, nenion mi povis fari. Je mia konfeso ni ekridegis kaj ne povis ne diri, ke ni ambaŭ estas ege similaj unu al la alia.

Nuboj jam estis for, la suno denove prilumis la teron. Ni pretervole deklamis la versojn:

*Tagiĝo, tagiĝo,
radias en rond',
la ombroj de nokto
forkuras el l' mond'.*

Du jarojn poste, t.e. en 1986, ni revidis nin en Pekino dum la 71-a UK. Tuj post lia alveno mi vizitis lin en la hotelo. Li ŝajnis tre laca, precipe kiam li aŭdis, ke lia pakaĵo ankoraŭ ne estas trovita. Mi konsolis lin, ke ĝi ne perdiĝos. Poste oni trovis la pakaĵon en la sama vespero, kaj mi vidis, ke li revigliĝis. Li partoprenis ekskurson kaj aliajn programejojn en la postaj tagoj. Ĉe la fino de la UK mi invitis al bankedo ĉiujn estraranojn de UEA kaj prelegantojn de la Kongresa Universitato. Mi aranĝis, ke la maljuna kaj iom malforta profesoro sidu apud mi. Li estis tre ĝoja, kvankam li malmulte parolis — mi sciis, ke li estas tre laca eble pro longa vojaĝo de Eŭropo al Orienta Azio, eble pro pli longa vojaĝo de la vivo malfacila, sed sinoferema kaj signifoplena. Post kiam li revenis hejmen, li skribis al mi plurfoje kaj verkis artikolon por EPĈ. Foje li tajpis ne klare kaj klarigis, ke li estas ege malforta, eĉ ne havas forton por pli bone tajpi aŭ korekti la tajperarojn. Leginte la leteron, mi estis iom melankolia, kaj antaŭ mi aperis la figuro de veterana batalanto. Li jam dediĉis ĉiujn fortojn al la homa progre-

(*Daŭrigo sur p. 17*)

Disfloru la spirito de Stafeto!

— Funebre al prof. Juan Régulo Pérez

MI legis la recenzon de F. de Diego pri “Rikolto”, la Esperanta verkaro de prof. Juan Régulo Pérez., aperintan en la malfrue alveninta decembra numero de “Esperanto”. Multaj ja scias, ke en la 1-a katalogo de Stafeto eldonita en 1958 jam aperis la titolo “Rikolto”, sed tamen prof. Juan Régulo Pérez *“ĉiam forferis sian propran intereson de aŭtoro al tio, kion li rigardis la devo de eldonisto, kaj preferis la aperigon de alies verko al la malkaŝado de siaj talentaĵoj, tio aldonas al liaj kromaj meritoj la palmaĵon de virto tiel malofta ĉe la literatoroj, la modesteco”* (vortoj de prof. G. Waringhien). F. de Diego titolis lin “nia brava eldonisto”. Jes, brava li estis. Ja estis li, kiu sentime fondis la faman eldonejon Stafeto en la ko-

menco de la kvindekaj jaroj por ŝtopi la breĉon postlasitan de la malaperinta Literatura Mondo. Lia “flamiĝema entuziasmo” kaj “pacienca obstino” kaj lia erudicio ebligis al li produkti grandan serion da altkvalitaj Esperantaj verkoj, el kiuj kelkaj estas eĉ kalkuleblaj kiel “epokfaraj”. Li faris sian bravan entreprenon celkonscie, kiel li skribis en sia katalogo: *“Ni estis bone konvinkitaj, ke pli ol ĉio nia literaturo garantias la lingvon kontraŭ pereco. Ni konsciis, ke verkoj neeldonitaj sufokas la verkiston kaj ke eldono stimulas plu ties talenton”*, kaj li klopodis prosperigi la Esperantan literaturon kaj stimuli la verkistojn per sia eldona aktivado. Multe li sukcesis! Mi estas unu el la legantoj de la Stafeto-libroj, kaj multe profitis el la nutrivaj laborfruktoj de prof. Régulo Pérez. Mi

sentis sinceran dankemon al li kaj liaj kunlaborantoj, kiam mi legis “Kvaropo”, “Infana Raso”, “Kontralte”, “Kiel Akvo de l’ Rivero”, “Esperanta Antologio”, “Floroj de l’ Malbono”, “Tridek Tri Rakontoj”, “Lingvo kaj Vivo”, “Topaze”, “Hamleto” k.t.p. Pro lia heroa aktivado la vorto “stafeto” ricevis apartan signifon en la Esperanta vortaro. Bedaŭrinde, Stafeto jam devis ĉesi aktivi pro nevenkeblaj malfaciloj. Sed Fonto komencis vigladi kaj jen dank’ al sia ŝprucanta energio jam aperis la “Rikolto” de prof. Juan Régulo Pérez. Jen alia Stafeto. Ni ja bezonas pliajn Stafetojn por la prospero kaj plena venko de nia afero. Ĉu ni ne rajtas esperi aperon de aliaj Stafetoj?

Ni bezonas novajn kaj novajn Stafetojn. Esperanto estas ja afero, por kies sukceso ne sufiĉas la forto de kelkaj talentuloj nek tuta generacio, necesas strebado de generacioj. Kaj prof. Juan Régulo Pérez donis al ni bonan, brilan ekzemplon per Stafeto, per la spirito de Stafeto.

Komence de februaro, kiel animskua tondro min frapis la funebra informo: “Forpasis profesoro Juan Régulo Pérez la 27-an de januaro!”

Forpasis! Tiel kruela estas la Morto! Ni ja tiel multe bezonas lin kiel standardiston en nia sturmado, kiel trumpetiston kur-

(Daŭrigo sur p. 43)

Prof. Juan Régulo Pérez (dekstre) kun ĉinaj kaj alilanda esperantistoj dum la 71-a UK en Pekino



LA Xinjiang- (Ŝingĵang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio havas areon de pli ol 1.6 milionoj da kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej granda provinc-nivela administra regiono de Ĉinio. Nun en la regiono vivas 14 milionoj da loĝantoj de la ujgura, hana, kazaĥa, huja kaj aliaj nacioj.

Xinjiang estas bona loko por turistoj. Antaŭe ĉiujare ĉirkaŭ 70 000 fremdlandaj turistoj vizitis la lokon, kaj en la lastaj kelke da jaroj ĉiujare ĝin vizitis 90 000, el kiuj duono estis japanoj.

Somere de 1991 la lokon vizitis karavano el 20 mez- kaj grandaĝaj japanoj. Por sperti la vivon de karavanoj sur la Silka Vojo en la antikveco, la japana karavano piediris de Hami en la orienta parto de Xinjiang al Urumqi (Urumĉi), ĉefurbo de la regiono. La distanco estas

POR KOMENCANTOJ

Bona loko por turistoj

500 kilometroj. Ĝi estis parto de la antikva Norda Silka Vojo. La vojo estas bone pavimita, la ripozejoj laŭ la vojo estas bone ekipitaj, kaj la karavanon sekvis aŭto, en kiu prizorgantoj estis pretaj por eventuala bezono de la karavano. Longa piedirado en seka kaj varma loko interne de Eŭrazio ne estis facila, kaj unu en la karavano aĝis jam 68 jarojn. Kiam la karavano atingis Urumĉi, altranguloj de la loka registaro bonvenigis ĝin ekster la urbo. La piedirintoj dronis en granda ĝojo pro sia

sukceso.

Julio, aŭgusto kaj septembro estas la plej bona sezono por vojaĝo en Xinjiang. Tiam ĉiuj lokaj hoteloj kaj gastejoj estas tre okupataj. Sed fakte Xinjiang estas tiom vasta, ke ĝi havas multajn vidindejojn kaj en ĉiu sezono la loko montras karakterizan belecon. En vintro Xinjiang estas bela kiel nordorienta Ĉinio. La altaj neĝaj montoj, la glaciigintaj lagoj, la senlima dezerto, la moroj de la centra-aziaj nacioj... ĉio estos neforgesebla por vi. ■

ABONTARIFO DE EPC

(Daŭrigo de p. 15)

so, kaj eĉ en la lasta momento ankoraŭ batis la arda sinoferema koro.

Hieraŭ nokte, gastante sur insulo en la Suda Ĉina Maro, mi informiĝis, ke la estimata kaj respektinda maljunulo forpasis, mi apenaŭ kredis, ke la informo estas vera. Tamen ĝi estas vera. Laŭ nia popoldiro, se falas iu stelo, tio signifas, ke forpasos iu granda homo. Dum januaro mi ĉiuvespere rigardis la ĉielon sur la marbordo, sed mi vidis neniun stelon fali. Neniun. La sinoferema maljuna profesoro ne mortis, li devas vivi, kaj li vivos ĉiam en la koroj de la esperantistoj tra la tuta mondo. ■

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40

ESP-NOVAĴOJ

● La 17-an de januaro 1993 la Liuzhou(Liŭgoŭ)-a E-Asocio de la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono okazigis sian 3-an plenan sesion, kiun ĉeestis pli ol 50 esperantistoj. En la sesio la 2-a konsilio de la asocio faris raporton pri sia laboro kaj i.a. raportis pri la 3-a Kongreso de la Guangxi-a E-Asocio okazinta decembre de 1992. En la sesio oni aprobis la statuton (projekto) de la Liuzhou-a E-Asocio kaj elektis ĝian 3-an konsilion.

● Por festi la 133-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof kaj la 100-an da-

treveno de la naskiĝo de s-ino Song Qingling (Song Ĉingling), la honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, la Ĉina Poŝta kaj Telekomunika Ministerio emisiis en la 20-a de januaro 1993 serion da memorigaj poŝtmarkoj. La Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio kaj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis poŝtstampilojn en Esperanto, kies projektintoj estas s-ro Xie Shaoxing (Ŝje Ŝaŭŝing) kaj s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linjuj).

● La eldonejo "Sezonoj" de Rusio eldonis en 1992 tri librojn en Esperanto: "Lingvaj Respondoj" de L. L. Zamenhof (laŭ la eldono de Esperantista Centro-Librejo en Parizo, 1927), "La

kalendaron de 1993. La kalendaro enhavas informojn pri gravaj eventoj en la historio de la E-movado kaj pri Esperantaj revuoj kaj libroj.

● De la 11-a ĝis la 22-a de januaro okazis Somera Lernejo de Esperanto en Adelaide de Aŭstralio, kiun partoprenis 92 esperantistoj el Pollando, Koreio, Japanio, Svedio, Irano, Nov-Zelando, Hungario kaj diversaj lokoj de Aŭstralio. Kadre de tiu lernejo okazis ankaŭ Sud-Aŭstralia Kongreso. La kursojn en 4 niveloj gvidis lertaj instruistoj, interalie So Gilsu kaj Vera Payne. Ĉiutage estis ekskursoj, monstro de videobendoj, distraj programoj kaj prelegoj. Ekde la venonta jaro la lernejo kaj kongreso okazos ĉiujare, anstataŭ ĉiun duan jaron, kaj la venonta okazos de la 10-a ĝis la 22-a de januaro 1994 refoje en Adelaide.

● Okaze de la 5-a Internacia Libro-Foiro de Teherano, inter la 5-a kaj la 15-a de majo 1992, la Eldonejo "Atai" de Teherano eldonis paralele en Esperanto kaj la persa lingvo la libreton de la pioniro de la ĉina movado s-ro Hujucz "La Idealo kaj la Realo de Internacia Lingvo". La perslingvan version tradukis Morteza Mirbaqin.

● Inter la 29-a kaj la 31-a de januaro 1993 okazis en Strážnize, Ĉeĥio, kunveno de SAT-membroj el Ĉeĥio. Ĝin partoprenis ankaŭ sekretario de SAT Kreŝimir Barkoviĉ el Parizo kaj ĝisnuna peranto de SAT por Ĉeĥoslovakio Miro Zavodsky. La partoprenantoj planas: 1. almenaŭ ĉiun duan jaron organizadi kunvenon de SAT-membroj el Ĉeĥa kaj Slovaka Respublikoj; 2. komunan vojaĝon al la 66-a SAT-kongreso en Bulgario aŭguste de 1993. SAT jam akceptis ilian proponon organizi la 67-an SAT-kongreson en Strážnize inter la 16-a kaj la 23-a de julio 1994.



Unuataga koverto kun poŝtmarkoj omaĝe al la 100-a datreveno de la naskiĝo de s-ino Song Qingling

trevenon de la naskiĝo de s-ro Guo Moruo, eminenta ĉina literaturisto kaj simpatianto de Esperanto, la Pekina E-Asocio, la Pekina Xiqu(Ŝjiĉju)-a Poŝtmarka Kompanio kaj la muzeo "Domo de Guo Moruo" kune okazigis filatelan ekspozicion, en kiu oni ekspoziciis poŝtmarkojn, unuatagajn kovertojn kaj aliajn filatelaĵojn pri d-ro L.L. Zamenhof, s-ro Guo Moruo, famaj ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Tiuj filatelaĵoj estis montrataj ankaŭ en la montrofenestroj de la Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio. Dum pli ol 50 tagoj la ekspozicio allogis milojn da vizitantoj kaj bone propagandis Esperanton.

● Okaze de la 100-a da-

Majstro kaj Margarita" (romano esperantigita el la rusa lingvo kaj unu el la Serioj Oriento-Okcidento), "Metropoliteno", originala romano de Vladimir Varankin (tria eldono). La libroj mendeblas ĉe UEA aŭ rekte ĉe "Sezonoj" (620014 Jekaterinburg, pk 162, Ruslando).

● La 26-a Somera Studsemajno okazos inter la 4-a kaj la 7-a de julio 1993, en Jyväskylä de Finnlando. Du instruistoj gvidos 4 kursojn: por komentantoj, por konversacia rondo, daŭriga kurso kaj prelegoj. Pliaj informoj haveblas ĉe s-ino Seija Kettunen, Kähäsmiehenkatu 3, SF-40630 Jyväskylä, Finnlando.

● Bulgara E-Asocio eldonis

Verda tago memorinda

LA 13-an de marto 1993, en Pekino fondiĝis la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA) kaj Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA). En la fondkunveno partoprenis pli ol cent esperantistoj. Ili venis ne nur el Pekino, sed ankaŭ el aliaj provincoj kaj urboj de Ĉinio.

S-ro Zou Guoxiang, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), prezidis la kunvenon. Samideanoj Yu Tao kaj Li Sen raportis la preparlaborojn por fondi la nomitajn asociojn. S-ino Li Yuping, vicprezidanto de ĈEL, komisiite de prezidanto de ĈEL s-ro Chen Yuan kaj la Konstanta

Estraranoj de ĈJEA en la fondkunveno



Komitato de ĈEL, esprimis varman gratulon pro la fondiĝo de la asocioj. En la kunveno oni legis la gratulajn leterojn de TEJO kaj telegramojn de lokaj Esperantaj organizaĵoj kaj individuoj. Fine, s-ro Zou legis la nomliston de la estraranoj de la du asocioj. S-ano Yu Tao estis elektita kiel prezidanto de ĈJEA kaj s-ano Li Sen kiel prezidanto de ĈFEA.

Estis la unua fojo fondi tiajn landajn fakajn asociojn en Ĉinio. Laŭ statistiko, plejparto de la 400 000 esperantistoj de Ĉinio estas junuloj. En Henan, Guilin, Nanchang, Shenyang, Ŝanhajo, Sanming k.a. funkcias junularaj E-asocioj. La lastan novembron venis al Pekino fraŭlino Sabira, vicprezidanto de TEJO. Ŝi faris prelegon al junaj e-istoj de Pekino kaj interŝanĝis opiniojn kun ĉinaj samideanoj pri fondo de organizaĵo de junaj e-istoj de Ĉinio. En la lasta decembro la prepara grupo de ĈJEA, subtenate de ĈEL, komencis sian aktivadon kaj ellaboris la statuton. Samtempe kun tio, ili sendis informilojn pri la fondiĝo al alilokaj e-istoj.

(Daŭrigo sur p. 39)

Fervojistoj-esperantistoj en la fondkunveno



La nova vivo de iuj ĉinaj kamparanoj

Teksto de XIAO NAN

Fotoj de HAN HONG

JE mencio de ĉinaj kamparanoj oni tuj ekpensis pri figuro kun nigraj vatitaj jakoj kaj pantalono, blanka mantuko, sulokplena bruna vizaĝo kaj paro da krudaj manoj. Kaj je mencio de la vivo de kamparanoj oni ĉiam parolis pri sarkilo, porkostalo, terlito kaj senkovra necesejo... Ĉiuj konfesas, ke la ĉinaj kamparanoj estas simplaj, honestaj, malkaŝemaj kaj tro provincaj. La kamparanoj ligiĝis kvazaŭ ĉiam kun malriĉeco kaj postĝinteco.

Sed hodiaŭ ĉinaj urbanoj aŭ alilandanoj, vizitante kamparon, rimarkas, ke multaj vilaĝoj jam aliĝis kaj kamparanoj ne estas tiaj, kiajn ili imagis. Iuj aferoj modernaj por urboj nun vidiĝas ankaŭ en la kamparo. La urbanoj komencas trakti la kamparanojn kun estimo.

VILAĜAJ KNABINOJ KAJ MANEKENOJ

Ĝenerale knabinoj ŝatas beligi sin, ankaŭ vilaĝaj knabinoj ne estas escepto. Tamen antaŭ dekelkaj jaroj multaj vilaĝoj estis malriĉaj. Se vilaĝaj knabinoj havis koloran ŝtonon por sia festa vesto, ili estis tre ĝojaj. Pri manekeno ili neniam aŭdis.

Somere de 1990 Yan Jingxia (Jan Ĝingŝja), kampara knabino de Jilin(Ĝjilin)-provinco en nordorienta Ĉinio, kaj ŝiaj kamaradinoj unuafoje portis modajn vestojn projektitajn de ili mem kaj fariĝis manekenoj, kio estis sensacia en la publiko. Poste ankaŭ ŝiaj 150 samlokaj knabinoj iris sur scenejon de vestomontrado. Kompreneble ili estas malsamaj ol la urbaj manekenoj: Ordinare ili laboras en kampo kaj en postlaboraj horoj ili faras prezentadon ankaŭ en draŝejo, bazaro kaj aliaj lokoj.

Tiuj kamparanoj-manekenoj es-

tas bonvenaj pro siaj karakterizaj gracieco kaj simpleco. Iuj televidaj stacioj telesendis ilian prezentadon. Majon de 1992 Yan Jingxia kaj aliaj 7 kamparaj knabinoj venis el norda vilaĝo en la movoplenan urbon Ŝanhajo. Akompanate de bela muziko, ili montris al urbanoj la ĉarmon de kamparanaj filinoj. Vilaĝaj knabinoj fariĝis manekenoj, kio signifas, ke kamparanoj starigas por si novan figuron.

TRI MAPOJ DE KAMPARANINO

“Kun vizaĝo al la tero, kun dorso al la ĉielo”, “Eklaboro ĉe sunleviĝo, ripozo post sunsubiro.” Tiu leĝo de antikve sekvata de la ĉinaj kamparanoj nun iom post iom ŝanĝiĝas. Tion povas pruvi la jena rakonto.

En 1987 juna kamparanino Song Shurong (Song Ŝujong) komencis

Pilkoludo



Kamparanoj-manekenoj





Kampanoj jam havas karaoke-aparaton.



En maljunulejo

Infano lernas ludi elektronan harmonikon.



fari negocon pri teo. Por aĉeti teon en te-produkta bazo, ŝi aĉetis lokan mapon. Kun helpo de la mapo ŝi vizitis preskaŭ ĉiujn te-ĝardenojn de la loko ĝis ŝi ekfunkciigis la unuan te-vendejon en sia vilaĝo.

Marte de 1989, por esplori te-produktejon, ŝi aĉetis ĉinan mapon. Ŝi vizitis preskaŭ ĉiujn te-produktejojn de la lando, funkciigis 6 te-vendejojn, 3 restoraciojn kaj unu pogranda te-vendejon kaj havigis al si familian havaĵon kun valoro de miliono da juanoj.

Lastatempe ŝi estis preta viziti alian landon. Ŝi aĉetis mondan mapon. La politiko de reformado kaj pordmalfermo malfermis por la ĉinaj kamparanoj pordon al ĉiuj partoj de la lando kaj mondo. La kamparanoj povas ne nur fari negocon kun alilandanoj, kiuj venis en Ĉinion, sed ankaŭ veturi al Rusio, Usono kaj aliaj landoj por kultivado de legomoj, funkciigo de restoracioj ktp.

TELEFONO, KARAOKE-APARATO KAJ VIDEOREGISTRORO EN KAMPARO

En iuj lokoj kamparanoj ne prenas kiel novaĵojn jenajn informojn el ĉinaj gazetoj.

Antaŭvespere de la Novjara Tago de 1993, kunligiĝis kun la internacia telekomunika reto 512 programe regataj telefonoj de iu urbeto de Shandong-provinco, entreprenanta samtempe agrikulturon kaj fiŝkaptadon kaj malproksima de urbo, kaj la loĝantoj de la urbeto tuj sentis, ke la mondo kvazaŭ malgrandiĝis.

En ĉiuj vilaĝoj de Dongsheng-subdistrikto en la antaŭurbo de Pekino troviĝas dancejo kaj 30% de la familioj havas karaoke-aparaton. Juna kamparano Zhang Jincai (Ĝang Ĝincai) kaj liaj 3 fratoj organizis orkestron kun elektronikaj muzikiloj per pli ol 50 000 juanoj.

Por lerni novan teknikon, iuj kamparanoj de Anhui-provinco invitis talentulojn pri scienco kaj tekniko esti direktoroj de iliaj kamparanoj.

En la provinco Hebei iu maljuna



En vilaĝa biblioteko

virino ne povis imagi, ke ŝi hodiaŭ portas videoregistratoron al kampo por registri la tutan procezon de la semado ĝis la rikolto.

SERVISTINO POR KAMPARANA FAMILIO

Dungi servistino estis afero ordinara antaŭ kelkaj jaroj en la grandaj kaj mezgrandaj ĉinaj urboj, sed tio vidiĝas nun en iuj kamparanaj familioj de Shandong.

Se antaŭe kamparanoj dungis servistinojn, oni eble demandus: Ĉu ili estas pagipovaj por la dungo? Nun kamparanoj estas riĉaj kaj tion povas. Eble oni starigus alian demandon: Ĉu ili bezonas dungi? "Jes", respondis kamparanoj. Fakte, post la ekpraktikado de la ekonomia reformado en la kamparo kamparanoj ne sole kulturis teron, sed ankaŭ funkciigas fiŝkaj kokobredejojn kaj vilaĝajn entreprenojn. Ili faras komercon, studas en vespera lernejo... Kompreneble dungi servistinojn necesas por junaj kamparanoj, ĉar tio povas solvi iliajn malfacilojn, kiel flegi infanojn kaj maljunulojn kaj fari hejmlaborojn, kaj havigi al ili pli da tempo por komercado kaj lernado.

DISTRIBUI AKCIOJN AL URBANOJ

Iun tagon de decembro 1992 Liu Kaihe, kamparano de Hunan-provinco, distribuis al la socio ak-

ciojn kun valoro de 100 000 juanoj por ekspluati montan teron kaj kultur persikarbojn kaj tuj subskribis kontrakton kun la aĉetantoj pere de notaria oficejo.

Liu Kaihe havas riĉan sperton en kulturado de fruktaroj. En 1986 lia familio komencis laŭkontrakte kultur 9.3 hektarojn da montaj kampoj por oranĝoj. En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la produktado de oranĝoj kaj la oranĝa merkato estis saturita, sekve li turnis sin al kulturado de aliaj fruktoj. Li enkondukis novan fruktovarian de flava persiko. En 1992 li rikoltis pli ol 1 000 kg. da flavaj persikoj, kiuj estis elĉerpitaj antaŭ ol eniri en la merkaton.

Tiaj persikoj estas grandaj, dolĉaj kaj altproduktaj, kaj maturiĝas frue en aŭgusto aŭ septembro. Por liveri tiajn persikojn al la merkato, Liu Kaihe laŭkontrakte ekkulturis en la lasta vintro pliajn 13.3 hektarojn da montaj kampoj de la vilaĝo kaj samtempe distribuis akciojn al la socio por kolekti kapitalon. Lastatempe la akcia administracio de Liu Kaihe deklaris, ke post 4 jaroj la administracio redonos la tutan monon kaj pagos interezon al la individuaj akciuloj, dividos dividendon laŭ akcioj kaj prenos ĉian riskon kune kun la akciuloj.

Antaŭe en Ĉinio akcioj estis distribuataj nur en evoluintaj urboj, sed nun ankaŭ en vilaĝoj malproksimaj de urboj.

La Drakboata Festo

Teksto de QIU HUANXING

Fotoj de LU ZHONGMIN

LA 5-a de la 5-a monato estas la tradicia Drakboata Festo de Ĉinio laŭ ties luna kalendario. Ĉina historia libro diras, ke en la 5-a de la 5-a monato 278 a.K., por la patrolando la granda ĉina patriota poeto Qu Yuan (Ĉju Jūan) sin dronigis en Miluo-rivero de la nuna Hunan-provinco. Por memori lin, oni okazigas diversajn aktivadojn, inkluzive de drakboata konkurso, en la 5-a de la monato ĉiujare, tial la tago portas la nomon Drakboata Festo (alinome, Festo de Duobla Kvino). Preskaŭ samaj estas la aktivadoj por tiu festo en diversaj lokoj de Ĉinio, i.a., pli solenaj estas la aktivadoj ambaŭborde de Miluo-rivero.

PENDIGO DE ARTEMIZIOJ KAJ AKOROJ

Frumatene de la Drakboata Festo multaj loĝantoj ĉe Miluo-rivero kolektas artemiziojn sur kampoj kaj akorojn ĉe riveretoj. Ili pendigas la kolektaĵon sur la pordoframon.

Pendigi artemiziojn kaj akorojn estas moro kun longa historio. La antikvaj ĉinoj rigardis la monaton malbonaŭgura, tial ili pendigis artemiziajn homfigurojn kaj spadformajn akorojn sur pordoframon por ekzorci la demonojn kaj diablojn. En suda

Ĉinio regas varma somero jam en la kvina monato. Tiam rapide kreskas kuloj kaj muŝoj. Ĉie aperas serpentoj, skorpioj, skolo-pendroj, araneoj kaj gekoj. Por preventi la minacon de malsanoj kaj venenaj insektoj kaj forpeli kulojn kaj muŝojn, oni uzas artemiziojn odorantajn amare kaj arome. Samtempe kun tio, oni miksas realgaron kaj vinon kaj verŝas la miksaĵon en ĉambrojn, kuirejojn kaj stalojn por forpeli fiinsektojn kaj mortigi bakteriojn. Kiel ĉina drogherbo, akoro havas la funkcion de sendolorigo, senmalvarmumigo kaj diurezigo. Tial, la pendigo de artemizioj kaj akoroj sur pordoframon en la Drakboata Festo fakte estas bona moro por preventi malsanojn en somero.

LA FESTO KAJ ZONGZI-OJ

La tagmanĝo de la loĝantoj ĉe Miluo-rivero en la Drakboata Festo estas *zongzi*-oj, kiuj prepariĝas el trempita glueca rizo, estas ĉirkaŭvolvitaj per fragmitaj folioj kaj prenas konusan formon. Kutime, oni manĝas *zongzi*-ojn kun iom da sukero.

Tamen, iom diferencaj estas la gustoj kaj materialoj de *zongzi*-oj faritaj en diversaj lokoj de Ĉinio. Ekzemple, en Pekino oni metas jujubojn en *zongzi*-ojn kaj trempas ilin en malvarma akvo antaŭ la manĝado. En Guangdong-

provinco oni farĉas *zongzi*-ojn per miksaĵo el kokaĵo, anasaĵo kaj fazeola kaĉo. Granda tia *zongzi*-o, ĉirkaŭvolvita per lotusaj folioj, pezas 0.5 kilogramon.

En Ĉinio la moro manĝi *zongzi*-ojn daŭras de 2 000-jaroj. Siatempe, aŭdinte ke poeto Qu Yuan sin dronigis en la rivero, la fiŝistoj tuj ekremis tien por lin savi. Ili remis kaj ĵetis *zongzi*-ojn en la riveron por manĝigi la fiŝojn, ke la lastaj ne manĝu la kadavron de Qu Yuan. El tio naskiĝis la moro pri la drakboata konkurso kaj preparo de *zongzi*-oj en la festo.

DRAKBOATA KONKURSO

En la festo sur Miluo-rivero bonorde viciĝis diverskoloraj drakboatoj, ĉiu kun longo de 20 metroj kaj larĝo de 1.5 metroj. La korpoj, kondukiloj kaj remiloj de la boatoj surhavas desegnitajn drakskvamojn. Grupo kaj grupo da remistoj en bluj, ruĝaj, flavaj kaj blankaj vestoj, ŝultre portante drakkapojn, venis al la Templo de Qu Yuan por kulti lin. Poste, ili kun drakkapoj ensaltis en la riveron por sin bani kaj fine aranĝis la drakkapojn sur la pruoj de la boatoj. Oni diris, ke post la banado glate iros la drakboata konkurso kaj la remistoj evitos katastrofojn kaj malsanojn.

En la komenco de la konkurso forte sonis gongado kaj tamburado sur la drakboatoj. La remistoj plenforte remis kaj la boatoj pafiĝis antaŭen sur la rivero. La rigardantoj ĝojkriis kaj aplaudis la konkursantojn el siaj vilaĝoj.

En tiu festo la drakboata konkurso okazas sur diverslokaj riveroj kaj lagoj de Ĉinio. Pro la malsameco de tradiciaj moroj kaj regionoj diferencas ankaŭ drakboatoj, ornamaĵoj kaj konkursaj manieroj.

La plej allogaj estas la drak-


(Daŭrigo sur. p. 42)




Auton drakboata konkurso



Drakboata konkurso






Meto de artemiziaj kaj akoraj folioj ĉe pordo



Kulto antaŭ la Templo de Qu Yuan



Laŭpeca ter-ekspluato sur la ĉina ĉeftero

de QIN HAIRONG

EN septembro 1987 Shenzhen (Ŝenĝen) de Ĉinio la unua vendis la uzrajton de terpeco al alilandano, kun validperiodo de 50 jaroj. De tiam rapide disvolviĝas laŭpeca ter-ekspluato. Tium rimedon Ĉinio aplikas en la reformo kaj por-domalfermo por venigi alilandajn investojn kaj plibonigi la investan medion.

La ĉina laŭpeca ter-ekspluato disvolviĝas de malalta nivelo al alta, de dislokitaj pecoj al kunligitaj, de porindustria uzado al la sinteza uzado por industrio, agrikulturo kaj fundamentaj instalaĵoj.

Antaŭ 1987 la reformo de la ter-utiliga sistemo estis en provado. La apero de specialaj ekonomiaj regionoj kaj la malfermo de marbordaj urboj bezonis la rapidan ŝanĝiĝon de la enlanda investa medio. Tiam la registaro komisiis al kompanioj fari laŭpecan ter-ekspluaton. Parto da kapitalo estis asignita de la registaro kaj pliparto pruntedonita de la kompanioj, kiuj reprenis sian investon per kolekto de ter-utiliga aŭ ter-venda pago.

En la jaroj 1987-1989 multiĝis la laŭpece ekspluatata tero, tamen la ekspluatataj regionoj estis malgrandaj kaj sporadaj, kaj la ekspluatado iris ĉefe en la prilabora kaj manufaktura industrioj.

Post kiam la ĉina registaro publikigis en majo 1990 "Reguloj pri Administrado de la Laŭpeca Ter-ekspluato Investita de Alilandanoj (Projekto)", la laŭpeca ter-ekspluato iris al nova etapo. Tiam alilandanoj multe investis kaj an-

kaŭ enlandaj kompanioj partoprenis tian ekspluaton. La investa strukturo transiris de la industrioj kun tiu prilabora kiel la ĉefa al tiuj elektronikaj, tekstilaj, maŝinfabrikaj, aparat-produktaj k.a. Kaj la ter-ekspluatado estis farata ne nur por industrio, sed ankaŭ por scienc-teknika afero, sinteza agrikulturo kaj terciara industrio.

La laŭpeca ter-ekspluato en Ĉinio estas farata en jenaj tri rimedoj:

Unue, "konstruado de nesto por venigi birdojn". La rimedo karakteriziĝas per tio, ke la ŝtato rekvizicias terpecojn kaj investas por bone fari sur ili fundamentan konstruadon kaj per tio allogi alilandanojn tien fondi entreprenojn.

Due, "konstruado de nesto far ekspluatantoj", t. e., akirinte la uzrajton de terpeco, la ekspluatantoj mem faras fundamentan konstruadon kaj allogas alilandanojn tien fondi entreprenojn.

Trie, "pruntado de nesto por venigi birdojn". La rimedo aplikigaĝas ĉefe en vilaĝoj proksime al urbo, t. e., la bazaj registaroj, helpate de la urbo, kaj utiligante la monon kolektitan el inter la kamparanoj, mem faras fundamentan konstruadon kaj allogas alilandanojn tien fondi entreprenojn.

Nemalmultaj ne komprenis la laŭpecan ter-ekspluaton fare de alilandanoj. Iuj eĉ opiniis, ke tio estas naciperfido. Kiel ajn granda estas ekspluatata terpeco kaj kiom daŭros la ekspluatado, en la ekspluatataj regionoj senescepte praktikiĝas ĉinaj leĝoj. La administraj rajtoj pri industrio, ko-

merco, imposto, dogano k.a. kaj tiuj pri la publikaj instalaĵoj por liverado de akvo kaj elektro, trafiko kaj telekomuniko estas ĉiuj tenataj de Ĉinio. La alilandanoj devas entrepreni kondiĉe, ke ili observos la ĉinajn leĝojn. Klariĝinte ĉion ĉi tion, oni forigis la miskomprenon. Nun la laŭpeca ter-ekspluato por alilandanoj estas unu el la ĉefaj rimedoj fari investon sur la ĉeftero de Ĉinio.

Sendube, laŭpeca ter-ekspluato, precipe tiu farata per alilanda investo, forte puŝas la disvolviĝon de regiona ekonomio de Ĉinio. Tamen iuj ekspluatantoj, akirinte la uzrajton, prokrastas fari ekspluaton por atendi plialtiĝon de terkosto, aŭ faras iomete da investo kaj poste vendas la rajton al aliaj en alta prezo. Kontraŭ tio en multaj lokoj oni alprenis efikajn rimedojn. Ekzemple, la magistrato de Chongqing (Ĉongĉing) faris decidon, ke la ekspluatataj terpecoj devas esti rekviziciitaj unue de la registaro kaj post fundamenta konstruado ili estas aŭkciesblaj; estas malpermesate vendi al la alilandanoj grandarean teron, por ke ili ne havu eblon profiti el tio, kaj ankaŭ malpermesate al ili pruntepreni monon sur la ĉeftero de Ĉinio por havi dombienan proprion; se alilandanoj pretas funkciigi dombienan entreprenon, sed pro manko de mono ilia ekspluatado ankoraŭ ne komenciĝas post duonjaro, la registaro reprenos la uzrajton de tero. Nun necesas montri, ke la supre dirita decido absolute malhelpas ne la avantaĝajn politikojn al la alilandanoj, nek la politikon utiligi alilandajn investojn. Ĝi donos ekskluzive bonan medion de investado. ■



Portretisto Dong Chensheng

Portretisto Dong Chensheng

de CHEN SI

DONG Chensheng ne estas fremda por niaj legantoj, ĉar liaj pentraĵoj vidiĝis en la revuo de 1983 kaj 1985. Kion li faras nun?

Iutage mi vizitis tiun grizharan maljunulon. Kiam mi demandis lin pri lia okupiteco, li kun ĝojo montris al mi sian “Budhan Mondon”, serion da budhaj portretoj vivecaj kaj signifoplenaj.

Liaj budhaj portretoj estas multe diferencaj de tiuj en la temploj. Ili estas pli belaj, elvokivaj kaj malpli majestaj, inertaj ol la lastaj. Sub lia peniko, la bodisatvo Avalokitesvaro ne plu estas ĉiela diino, sed tenera patrino, kiu kompatas ĉiujn malfeliĉulojn en la mondo. La bodisatvo Samantabhadra kiel juna knabino gravmiene sidas sur blanka elefanto. Tradicie, oni pentris budhan portreton per delikataj linioj, sed li liberstile skizis la konturon per tuĉpeniko kaj delikate desegnis la ŝlosilajn lokojn, tiel ke, liaj pentraĵoj estas ne nur vivoveraj, sed ankaŭ ver-similaj.

La budhaj portretoj de s-ro Dong havas striktan rilaton kun lia propra travivaĵo. Li naskiĝis en Tangshan, Hebei-provinco, tamen en lia juna aĝo, lia familio transloĝiĝis en la urbon Qinhuangdao (Ĉinhuangdaŭ). Lia patro estis popola pentristo, lerta en farado de budhaj portretoj kaj entreprenis en la loko butikon de diaj portretoj. Ja en tiaj vivkondiĉoj Dong kreskis kaj iris sur la pentristan vojon. Tiam en la korto, kie estis

la hejmo de Dong, loĝis ankaŭ teatraj trupoj. Pro tio li forte ekamis teatraĵojn. Li ofte enŝteliĝis en teatron por ĝui la ludon. Sekvante sian patron, li ofte vizitis budhisman templon kaj rigardis la tieajn budhajjn statuojn kaj portretojn. Tio tre utilis al lia estonta artista kariero.

Plenkreskinte, li fariĝis belarta redaktoro de iu ĵurnalo. Tiutempe li havis ŝancon konatiĝi kun grandaj modernaj pentristoj kaj ĝui famajn pentraĵojn ĉinajn kaj alilandajn. Li bone sciis, ke lia arta nivelo estas malalta, tial li komencis energie ekzerci sin en skizado. Tiam li inkliniĝis al la teatraj figuroj kaj sin ekzercis en pentrado de roloj de la pekina opero. Finfine aperis sub lia peniko nova arta mondo — portretoj de pekin-operaj roloj, kiuj baziĝis ĉefe sur liberstila skizado. Firme kaptante la ĉefan karakteron de la pekina opero kaj laŭeble preteratentante la akcesoraĵojn, li skizis per dikaj linioj la figurojn similajn al la geometriaj kaj poste traktis la detalojn ĉefe per nigra kaj ruĝa koloroj. Per tio li vivigas la pekinan operon sur papero.

Tio ja ne estas maksimumo por li. Kun tempopaso li maturiĝis sur sia arta kampo. En lia artista praktiko naskiĝis pli da filozofaĵoj, la pentraĵo “Budha Mondo” ja estas la atesto. Ĉu tio markis lian artan ekstremon? Rigardante kolekton de siaj pentraĵoj kaj budhaj portretoj, kun rideto li diris al mi: “Tio estas miaj ekzercaĵoj.” ■



Kazaha knabino en printempo

Bodisatvo Samantabhadra



Rolo de pekina opero

Sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio al modernigo

POR disvolvi la scienc-teknikan aferon Ĉinio ĉiam persistas en la principo konstante kaj stabile disvolvi esploron pri bazaj teorioj. Ĉinio gajnis mondnivelajn atingojn en la kampoj de atomenergio, spaco, alt-energia fiziko, biologio, komputero kaj telekomuniko, kaj ankaŭ en medicino kaj higieno, geoscienco, kemio kaj matematiko.

De la 24-a de aprilo 1970, kiam Ĉinio sukcese lanĉis la unuan artefaritan sateliton, la esplorado pri tiu kampo estas atentoaltira. Lastjare oni sukcese sendis la telekomunan sateliton "Aussat B", produktitan de Usono por Aŭstraliø, en difinitan orbiton per la kunligita transporta raketo "Changzheng 2", projektita kaj elfarita de Ĉinio. Tio montris, ke la ĉina spaconaŭtika tekniko jam eniris en la internacian merkaton.

La 21-an de julio 1990 la Pekina Elektron-Pozitona Koliiziilo estis ekspertizita de la ŝtato kaj transdonita al uzado. Ĉinaj sciencistoj eksperimentis per tiu koliziilo kaj ricevis novajn masajn datenojn de korpusklo τ , kies precizeco estas 5-7-oble pli alta ol tiu ricevita en aliaj landoj, tiel ke estis forigita la teoria miskompreno kaŭzita de la ekarto de la masaj datenoj de korpusklo τ . Samtempe kun tio, la ekzisto de la nova korpusklo ξ estis konstatita, kio altiris la atenton de la rondoj de altenergiaj fizikistoj en la mondo.

Dank' al sia trijara penado, la Ĉina Akademio de Sciencoj atin-

gis gravan sukceson en la "studo pri la nova nukleino, sintezita per peza jono, kaj ĝiaj transmutacio, strukturo kaj formado". Ĉinaj sciencistoj la unuaj en la mondo sintezis tri novajn nukleinojn: plateno-202 (202-Pt), hidrargo-208 (208-Hg) kaj hafnio-185 (185-Hf). La sintezo de la novaj nukleinoj riĉigos kaj profundigos la konadon pri la interna strukturo kaj movada leĝo de nukleo, disvolvos la strukturan teorion kaj modelon de la ekzistanta nukleo kaj akcelos la disvolviĝon de la nuklea fiziko, astrofiziko kaj radioke-

mio. La unua rubena lasero de la mondo estis provfarita de usonaj sciencistoj en 1960, kaj ĉinaj sciencistoj sukcese faris la unuan tian laseron de Ĉinio septembre de 1961. Nun Ĉinio povas plimalpli spuri la progreson de eksterlandaj ĉefaj laserteknikoj.

Ĝi ankaŭ ricevis multajn elstarajn atingojn en la lasera aplikado. Jam estas vaste uzataj laseraj semokulturado, kuracado kaj kompostado. La grandpova pulso-lasero kun internacie avangarda nivelo, farita de Tianjin-universitato, kiel lumfonto por prilabori ilmaŝinon, povas senkontakte prilabori metalajn, ne-metalajn kaj materiale miksitajn elementojn. La grandpova neodim-vitra lasera instalaĵo, farita por studi plasmon kaj nuklean reakcion, donas 1 000 ĵulojn da energio. Per alta kvalito, ĝi estas rigardata kiel unu el la samspecaj instalaĵoj malmultaj en la mondo.

La disvolviĝo de komputera tekniko manifestas scienc-teknikan nivelon de la lando. Post la apero de la superkomputero Lakta Vojo I povanta fari cent milionojn da operacioj sekunde, ĉinaj sciencistoj provfaris alian

Fama fizikisto prof. Tsung-dao Lee (la dua de maldekstre en la fronta vico) en la centra regadejo de la Pekina Elektron-Pozitona Koliiziilo





Ĉe la kompleta simulilo de termoelektra generatoro

superkomputeron Lakta Vojo II povantan fari miliardon da operacioj sekunde. Ĝia sinteza traktopovo estas 10-oble pli granda ol tiu de la Lakta Vojo I. Tiu komputero povas fari komplikajn kalkulojn kaj trakti grandnombrajn datenojn de la kampoj meteologia, petrola, nukle-energia, aernaŭtika, spaconaŭtika kaj sistmologia.

De la 60-aj jaroj Ĉinio ricevis kelkajn elstarajn atingojn en la bioscienca esplorado. Ĉinaj sciencistoj la unuaj en la mondo sintezis la vivhavan bovinan insulinon septembre de 1965 kaj transligis gistan alaninon al ribonukleata acido novembre de 1981, kio montris, ke ĉinaj sciencistoj okupas la internacie avangardan lokon en esplorado pri sinteza biomakromolekulo. En 1990 ĉinaj sciencistoj la unuaj en la mondo determinis la ordosistemon de alttemperatura deoksid-ribonukleata acido. Tio estas grava progreso en la studo de vivscienco. La atingo vaste aplikigas en la biokemia kampo en- kaj eksterlanda.

Direktate de la teorio de ĉinaj sciencistoj pri petrol-geologio kaj olekampo-ekspluato, oni malkovris kaj ekspluatis novajn petrolkampojn, kiaj tiuj de Daqing (Daĉing), Zhongyuan

(Ĝongjŭan) kaj Shengli. Shengli-olekampo kaj la Ŝanhaja Jiaotong(Ĝjaŭtong)-universitato kune projektis malprofundegamaran platformon Shengli 2, kiu ekfunkciis en 1992. Ĝi estas platformo senprecedenca en kaj ekster la lando. En flosado ĝi povas sin treni al borota puto en malprofunda maro kaj fari boradon, mallevente la bazon. Se ĝi grundas sur la malprofunda maro, ĝi povas sin movi al la puto kaj reiras fininte sian laboron.

Por disvolvi ekonomion, oni unue devas solvi la problemon de energio. Post kiam la grandaj hidroelektrejoj Gezhouba kaj Longyangxia (Longjangŝja) komencis doni elektron, en 1992 la ĉina registaro decidis konstrui grandan pivotan hidroelektrejon ĉe la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero. En 1991 la unua nuklea elektrejo Qinshan (Ĉinŝan) kun kapacito de 300 000 kilovattoj, kiu estis projektita kaj konstruita de Ĉinio mem, jam komencis produkti elektron. La simulilo STAR-90, projektita de la Nordĉinia Elektroenergia Instituto kaj Qinghua(Ĉinghŭa)-universitato kaj produktita de la Pekina Elektroenergia Fabriko de Aŭtomataj Ekipaĵoj estas aplikata sur la kompleta simulilo de la termoelektra generatoro kun kapacito de

300 000 kilovattoj, produktita de la Ningxia(Ningŝja)-a Elektroenergia Buroo. La sistemo de la simulilo vaste aplikigas en simuloj de diversaj generatoroj, multe plialtigas la kapablon de la manipulantoj, reduktas akcidentojn en la funkciado.

Kiel granda agrikultura lando, Ĉinio devas turni sian atenton al la agrikultura scienc-teknika disvolvigo por ŝanĝi la postĝintecon de agrikulturo. Meze de la 50-aj jaroj Ĉinio sukcese elkulturis mallaltigajn mutaciojn de rizo, la unuajn en la mondo. Dank' al tio, la mua (unu muo=1/15 hektaro) produktokvanto de rizo pliiĝis je 50-150 kg. En la 70-aj jaroj ĉinaj sciencistoj elkulturis unuafoje en la mondo masklan rizon kun la linioj sterila, konserva kaj restaŭra. Kompletigis la tri linioj kaj grandkvante elkulturiĝis hibridigitaj bonspecioj. La mua produktokvanto de rizo pli grandigis je pli ol 50 kg ol tiu en la 50-aj jaroj. En la lastaj jaroj ĉina agronomo Yuan Longping, inventinto de hibridigita rizo, prezentis novan hipotezon: transiri de tri al du linioj, kaj plue, al unu linio. Nun li jam sukcesis en la esplorado pri rizo kun du linioj. La mua produktokvanto de tiu hibridigita rizo estas alta je 5-10% pli ol tiu kun la tri linioj, kaj krome, ankaŭ la kvalito de rizo multe pliboniĝis.

Per la atingoj gajnitaj en la scienc-teknikaj kampoj Ĉinio liberigas sin el la postĝinteco kaj marŝas al la modernigo. Tamen, estas multaj malfacilaĵoj sur la vojo al la scienc-teknika disvolvigo de Ĉinio. La industria kaj agrikultura scienc-teknika nivelo de Ĉinio ankoraŭ estas malalta, estas kompare malgranda la proporcio de la fonduso por scienc-teknika esplorado en la totala nacia produktovaloro, ĝia proporcio en la nacia ekonomio estas multe malpli granda ol tiu de la evoluintaj landoj. Alivorte, la ĉinaj sciencistoj devas iri ankoraŭ tre longan vojon. ■

En infan- ĝardeno

Fotoj de DA WEI

Mezurado de staturu




Gajaj infanoj


Gepatroj akompanas siajn infanojn al infanĝardeno.





En mangôcambro





Qu Lingjun kaj lia papera drakoŝipo

de LI QIANG

QU Lingjun (Ĉju Lingĝjun), en okulvintroj, estas maldika. Li estis belarta instruisto en elementa lernejo kaj nun laboras en klimatizila fabriko en Baoji (Baŭĝji) de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco.

Mi vizitis lian malgrandan atelieron kaj tre admiris lian laboron. Lia papera drakoŝipo estas delikata artaĵo saĝe strukturita.

En lia ateliero estas du kunmetitaj tabloj, sur kiuj kuŝas papera drakoŝipo. La blanka drako portas sur sia dorso grupon da luksaj klasikaj palacaj konstruaĵoj de orienta arkitekturo. Qu Lingjun diris al mi, ke la ŝipo longas 1.85 metrojn, altas 0.9 metron kaj larĝas 0.45 metron. La tuta artaĵo pezas 8 250 gramojn. Krom la pivotoj de la pordoj kaj ĝiaj frapringoj el metala drato, ĉiuj aliaj pecoj de la ŝipo estis faritaj el blanka kartono en 18 monatoj.

La drako estis kovrita de skvamoj. Ĉiu skvamo estis farita el unu kvadrata paperslipo, kvar diversgrandaj trapezaj paperpecoj kaj 4 algluaĵoj. La drako havas entute 1 100 skvamojn. El ĝia faŭko elpendas ĉeno, kiu povas moviĝi pere de vinĉo. La longa korpo de la ŝipo estis ĉirkaŭita de longa ĉeno kiel ornamaĵo kaj apud ĝi estis alligita malgranda drakoŝipo. La ĉeno havas 610 erojn.

Sur la dorso de la drako estas impona palaco el multaj haloj, arkadoj kaj kiosko por ŝakludo. La haloj estas interligitaj per pontoj kaj koridoroj, kaj interalie ornamigas en la palaco 7 palacaj lanternoj. La haloj kun pluraj tegmentaj aleroj sidas sur bazamento ĉirkaŭita de balustrado. En la kiosko estas tablo kaj benkoj, kaj sur la tablo estas ŝaktabulo kun ŝakpecoj.

La aĵuraj pordoj kaj fenestroj en alto de 2-3 centimetroj estas moveblaj. Per bastoneto s-ro Qu

malfermis kelke da fenestroj, kaj tra la fenestroj mi enigardis kaj vidis diversajn meblojn, kiaj lito, tablo, benko, tableto kaj ekrano. S-ro Qu Lingjun diris al mi, ke sur la ŝipo estas 360 gravuritaj apogreloj, 670 kolonoj kaj 250 malfermeblaj pordoj kaj fenestroj. La tuta ŝipo havas pli ol 30 000 pecojn.

S-ro Qu Lingjun naskiĝis en artista familio. Li tre ŝatis pentradon. Li verkis pli ol 20 bildlibrojn kaj multe da pentraĵoj, kaj multaj el ili estis premigitaj. Foje en la manlabora leciono li estis inspirita de la naivaj paperaj ludiloj faritaj de lernantoj. De tiam li komencis fari el papero motorciklon, aeroplanon, ŝipon, domon k.a. Li faris por sia filineto klasikan ĝardenon. Liaj verkoj estis tre ŝatataj de liaj konatoj.

Qu Lingjun legis multajn materialojn kaj trovis, ke la papera metiartaĵo estiĝinta en la mezo de la 20-a jarcento progresis malrapide. Liaj verkoj ne estis malpli bonaj ol la eksterlandaj. Li decidis fari la plej grandan, plej komplikan kaj plej delikatan paperartaĵon en la mondo. Kaj drakoŝipo fariĝis lia temo.

Drako estis totemo de antikvaj ĉinoj, kaj la ĉina nacio estas rigardata kiel posteulo de drako. Nun en la mondo drako ankoraŭ simbolas la civilizacion de Ĉinio. Oni faris drakon el jado, eburo, ligno, ŝtono k.a., kaj nun Qu Lingjun volis preni paperon kiel materialon por fari drakon. Li ne bezonis skizon, nek modelon, li faris nur laŭ la desegno en la kapo. Li renkontis multajn malfacilojn, sed li ĉiam estis venkanto. Liaj saĝo, persistemo kaj memkonfido kondukis lin al la sukceso de elfaro de tiu ĉi papera drakoŝipo. ■

XU AIZHONG:

Narsa vivas feliĉan vivon



Narsa kaj ŝiaj edzo kaj infano

EN marto de 1968, sur la stepo Xilin Gol de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio naskiĝis Narsa, kies nomo signifas "pinon" en la mongolia lingvo. Ŝiaj gepatroj esperis, ke ŝi estos forta kaj bela kiel pino.

Kiam Narsa estis 2-jara, ŝi estis brogvundita de bolanta teo kun lakto. Ŝi laŭte ploris de doloro, kaj ŝia patrino svenis de koroŝiro, vidinte la malfeliĉon. Post rekonsciigo, la patrino, kun rigidaj rigardoj kaj konfuzita mieno, interplektis siajn manojn kaj lamentis: "Mia kara Narsa!" Ekde tiam ŝi fariĝis aliena.

La dekstra duono de la korpo de Narsa estis serioze brogvundita. Por la malalta medicinista nivelo, la loka hospitalo ne sukcesis ŝin resanigi. Ŝia patro multe klopodis por trovi doktoron kuraci Narsa, kaj samtempe li devis prizorgi sian malsanan edzinon.

Pasis kvar jaroj, Narsa restis malsana, kaj plie ŝi suferis pli seriozan doloron. Ŝi ĉiutage baraktis en malfeliĉo. La adhero kurbigis ŝian dekstran kruron kaj ŝi ne kapablis rekte stari. En 1974, ŝia patro petis iun alian prizorgi sian malsanan edzinon hejme kaj mem portis la knabinon surdorse al hospitalo de Hohhot.

La patro kaj la filino kun lasta espero petis helpon de la Hospitalo de Interna Mongolio en Hohhot. Informiginte pri la malfeliĉo, flegistino Zhang Qingfen (Ĝang Ĉingfen) profunde kortuŝiĝis. Ŝi petis provizoran malsanulan liton por la juna knabino, ĉar tiam en la hospitalo ĉiuj litoj

estis okupataj. Post kiam la patro de Narsa revenis al la stepo, Zhang Qingfen patrinece prizorgis Narsa.

Dank'al la zorgema kuracado kaj flegado de Zhang Qingfen kaj kuracistoj Narsa resaniĝis kaj revenis al la stepo post 11 monatoj. Bedaŭrinde, pro manko de necesaj medicinaj kondiĉoj sur la stepo, la cikatriĝinta vundo infektiĝis kaj ekpulis denove. Ŝia dekstra supra gambo adheris al la suro. Narsa refoje falis en danĝeron. En 1977, ŝia patro refoje portis Narsa al la Hospitalo de Interna Mongolio en Hohhot, sed ĉifoje li ne havis monon por la kuracado. Zhang Qingfen refoje helpis ilin. Ŝi enhospitaligis Narsa kaj zorgeme flegis ŝin. Krome, Zhang aĉetis kajeron kaj krajonon por ŝin lernigi.

En la hospitalo Narsa fariĝis aparta paciento. Kvankam ŝiaj gepatroj ne estis ĉe ŝi, tamen multaj vizitis ŝin kaj donacis al ŝi monon, necesajojn kaj manĝaĵojn, inter ili estis kuracistoj, flegistinoj kaj aliaj malsanuloj. La koncernaj registaraj departementoj, informiginte pri tio, donis al ŝi subvencion.

Hana laboristino Ban Shuzhi de la Dua Lana Ŝpinejo de la Interna Mongolio rigardis Narsa kiel sian propran filinon, ĉar ŝia filino iam estis kuracita en la sama ĉambro kun Narsa. Post enhospitaligo de sia filino, ŝi daŭre vizitis Narsa portante al la knabino nutraĵojn. Ŝi faris flikadon kaj ofte lavadon por Narsa, kaj donacis novan vatan veston al la knabino antaŭ la Printempa Festo. Por Narsa Ban patrinece faris

ĉion, kion ŝi povis.

Malgraŭ la zorgema flegado far doktoroj kaj flegistinoj, la malsano de Narsa graviĝis. Oni decidis fortranĉi ŝian dekstran gambon plejparte putriĝintan. En la tagoj post la operacio, Ban Shuzhi sidis ĉe Narsa tagnokte. Ŝiaj okuloj ruĝiĝis kaj ŝi maldikiĝis pro lacego. Multaj laboristoj en ŝia fabriko donacis monon kaj necesajojn al Narsa. Ĉiuj kun granda simpatio traktis la kompatindan knabinon.

Finfine Narsa resaniĝis kaj enhospitaligis. Inter Ban Shuzhi kaj Narsa naskiĝis profunda amo. Kun la konsento de la gepatroj de Narsa, la knabineto komencis sian novan vivon en la familio de Ban.

En la nova familio Narsa feliĉe vivis. Poste ŝi fariĝis lernanto de la elementa lernejo fondita de la fabriko. Kiam oni okazigis bonvenigan kunvenon por tiu ĉi kriplulino, Narsa emociiĝis ĝis larmoj. Ŝi diligente lernis.

Post finiĝo de lernado en la mezlernejo, Narsa fariĝis laboristino de la Dua Lana Ŝpinejo. Ŝi estis plurfoje honorita kiel modela laboristino pro siaj laboremo, diligenteco kaj alta devokonscio. Iu knabo enamiĝis en tiun ĉi knabinon kriplan sed persisteman kaj entuziasman. Ili geedziĝis. Lastan someron la geedzoj kune kun sia infano kaj patrino Ban veturis al la stepo por viziti la gepatrojn de Narsa. Vidante tiun ĉi feliĉan familion, multaj ŝiaj najbaroj larmis de ĝojo. Ili neniam imagis al si post ŝia kripligo, ke Narsa povas esti tiel forta kiel pino. ■



Parto de la templo

Tegmenta ornamaĵo el skulptitaj brikoj




La Tambura Turo



Kuriozaj konstruaĵoj en Ningxia

Fotoj de WU XINHUA



Templeto por Sanktulo Luzu

En la gubernio Zhongwei (Ĝongŭej) de Ningxia (Ningsĵa) apud la Flava Rivero en la fino de la dezerto staras la Templo Gaomiao konstruita en la jaro 1403 en Ming-dinastio. Post plurfojaj plivastigado kaj rekonstruado la templo nun havas areon de 4 100 kvadrataj metroj. En la templo estas 200 ĉambroj kaj la plej alta konstruaĵo altas 29 metrojn. En la antaŭa korto estas Bao'an-templo, kie restas malgranda pordoturo konstruita en la Suda Song-dinastio (1127-1279). En la traireja halo staras statuo de Majtreja, kaj ambaŭflanke de li gardas po du ĉielaj generaloj. La ĉefa halo Mahavira havas tri etaĝojn. En la unua etaĝo sidas statuoj de Ŝakjamunio, Manjusri kaj Samantabhadra kaj 18 arhatoj. En la dua etaĝo estas tri sanktuloj de la kvar direktoj de la mondo, kaj en la tria etaĝo estas statuoj de budhoj de la kvin partoj de la mondo. Antaŭ kaj ambaŭflanke de la ĉefa halo staras la Sonorila Turo, la Tambura Turo kaj la Pavilono de Avalokitesvaro. La strukturo de la templo vere estas majstraĵo kaj la plano de la konstruaĵoj similas al fluganta fenikso.

Gaomiao-templo



Kunikloj tre plaĉas ĉinojn

— Respondo al s-ro M. Jacques pri kunikloj, transitiveco k.t.p.

NIA franca samideano Manceau Jacques skribis al ni, ke li “delonge legas *El Popola Ĉinio*... aĉetis plurajn ĉinajn kuirlibrojn pri ĉinaj manĝaĵoj... ofte iris en ĉinajn restoraciojn en Parizo; en la manĝolisto... trovis anasojn, fiŝojn, salikokojn, bovaĵon... sed neniam KUNIKLAĴON kaj... venis al la konkludo, ke ĉinoj ne bredas kuniklojn.” Li diris, ke antaŭe francaj kamparanoj bredis kokinojn, kuniklojn kaj anasojn, sed nun la kamparanoj malmultiĝis kaj la kuniklo preskaŭ malaperis sur la bazaroj. Li “kredas la maloftecon de kunikloj en Ĉinio kaj en Azio ĝenerale.” Li ankaŭ volas scii, kion pensas la ĉinoj pri transitiveco, netransitiveco en E-o k.t.p.

Mi parolos nenion pri kunikloj en aliaj aziaj landoj pro neinformiteco, sed diros kelkajn vortojn pri kunikloj en Ĉinio. Nia lando havas historion de pli ol dumil jaroj pri bredado de kunikloj. La ĉina raso de kuniklo havas fortan rezistan povon kontraŭ malsanoj kaj generas abunde, sed produktas ne multe da viando kaj ĝia hararo estas maldelikata, tial kuniklistoj enkondukis bonajn speciojn de kunikloj el Japanio, Belgio, Nov-Zelando, Francio, Germanio, Turkio k.a. landoj. La Ankara kuniklo havas longajn kaj fajnajn harojn kaj povas doni ĉiujare 300-400 gramojn da lano. La belga kuniklo pezas pli ol 5 kg. kaj povas doni multe da viando. La japana blanka kuniklo kun grandaj oreloj taŭgas por medicin-laboratoria uzado. Per hibridigado kaj selektado niaj kuniklistoj ricevis pli bonajn variojn de kunikloj bonrasaj. En 1981 Ĉinio eksportis pli ol 4 000 tunojn da kunikla lano kaj pli ol 40 000 tunojn da kunikla viando, kaj sekve fariĝis la plej granda eksportanto de tiuj varoj en la mondo. En Pekino oni povas facile ricevi kuniklan viandon el butikoj. Ĝi estas pli multekosta ol porkaĵo, ĉar ĝi estas riĉa je proteino kaj ne tiel grasa, do tre bona por suferantoj de hipertensio kaj kormalsanoj. Krom produkti delikatan viandon, valoran felon kaj fajnan lanon, la kunikloj utilas ankaŭ pro tio, ke ili produktas tre multan kaj bonkvalitan sterkon por fekundigi kampojn kaj iliaj hepato, lieno, galveziko, testikoj kaj fetoj estas valoraj materialoj por

fabriki drogojn. Bredado de kunikloj estas profitodona kaj facila eĉ por maljunuloj, virinoj kaj infanoj. Ne estas mirinde, ke en Ĉinio multaj homoj partoprenas tiun profitodonan flankokupon kaj aperis granda nombro da kuniklistoj.

Eble vin ne plaĉas la vorto “kuniklisto”, per kiu mi nomas homon, kiu bredas kuniklojn. Se ni povas uzi la vorton “fiŝisto”, kial do ne la vorton “kuniklisto”? Vi dirus, ke “fiŝisto” signifas: tiu, kiu metie kaptas, bredas aŭ vendas fiŝojn, ĉu “kuniklisto” ne devus signifi: tiu, kiu metie kaptas, bredas aŭ vendas kuniklojn? Do la vorto “kuniklisto” ne diras, kion ni volas, kaj estas ne tute akceptebla. Jen leviĝas alia demando: Se ni povas verbigi la substantivan radikon “fiŝ” kaj ricevi “fiŝi”; ĉu ni ne povas verbigi “kunikl” kaj ricevi la verbon “kunikli”? Verŝajne jes. Sed ne. “Fiŝi” signifas “fiŝkapti”, do “kunikli” devus signifi “kaptadi kuniklojn”. Iuj aliaj eble opinius, ke “kunikli” devas signifi “esti kuniklo”, ĉar kutime el substantivaj radikoj ni ricevas, per aldono de la infinitiva finaĵo, verbon signifantan “esti -o” aŭ “agi per -o”. Ekzemple, kelneri = esti kelnero (sed ne agi per kelnero), marteli = agi (frapi) per martelo (sed ne esti martelo), piedi = agi (iri, sed ne bati) per piedo. Se la vorto “kunikli” estus neakceptebla, do ankaŭ “kuniklisto” estus neuzebla. Kion fari? Do mi uzu la esprimon “bredisto de kunikloj”? Nu, memoru la ekziston de la popularaj vortoj “bovisto” kaj “ŝafisto”. Ĉu ni ne povas imiti iliajn ekzemplojn?

Iuj aliaj eble rimarkigus al mi, ke mi ne devas uzi la esprimojn “plaĉas ĉinojn”, “vin ne plaĉas”, “parolos nenion” kaj “partoprenas tiun profitodonan flankokupon”, ĉar plaĉi, paroli kaj partopreni estas netransitivaj verboj. Jes, vere, oni devas distingi la transitivajn verbojn de la netransitivaj. Sed kio estas transitiva verbo kaj kio netransitiva verbo? Jen ni tuŝas alian demandon, kiu interesas nian francan s-anon M. Jacques.

Laŭ PIV, transitiva verbo “esprimas agon, kiu pasas de subjekto al objekto” kaj netransitiva verbo “esprimas agon, kiu koncernas nur la subjekton kaj ne pasas al la objekto”. Kaj ekzistas du specoj



Tondado de kunikloj

de objektoj, nome rekta kaj nereкта objektoj. Kaj la nereкта objekto estas ofte enkondukita de prepozicioj al, de, pri. Ekz. "Li mokas Johanon pri lia lameco." En la frazo "Johanon" estas rekta objekto kaj "lameco" estas nereкта objekto. La rekta objekto estas signita per akuzativa finaĵo -n. Tute klare, ĉu ne? Sed ne ridu. La verbo "ridi" tuj prezentos al ni problemon. Laŭ PIV "ridi" estas netransitiva verbo, sed tamen Zamenhof skribis: "Kaldrono ridas pri poto kaj mem estas koto." (*Proverbaro*) kaj "ili ridis lin pro lia peto" (*Fabeloj de Andersen*). Ĉu "lin" ne estas rekta objekto kaj "poto, peto" ne estas nerektaj objektoj en la frazoj? PIV eraris? Z. eraris? Hodiaŭ ja ofte oni diras: ridi iun, ridi ion de iu.

Ankaŭ "oponi" kaj "partopreni" estas netransitivaj laŭ PIV, sed nun ofte oni diras "oponi iun"

(*Daŭrigo de p. 19*)

La ĉinaj fervojistoj-esperantistoj estas grava konsistiga parto de la ĉina E-movado. Ili multe kontribuis al nia movado en la pasintaj jaroj. Jam en 1984 oni fondis la unuan fervojistan E-grupon en Hohhot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, subtenate de ĈEL. Nun troviĝas fervojistaj E-grupoj en pli ol dek urboj de Ĉinio, kiaj Pekino, Shenyang, Harbin, Zhengzhou, Ŝanhajo, Lanzhou, Kantono, Chengdu kaj Liuzhou. En 1987 la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF) akceptis la Unuiĝon de Ĉinaj Fervojistaj Esperanto-Grupoj kiel sian 20-an sektion.

"oponi ion" kaj "partopreni ion". En *Lingvaj Respondoj*, anstataŭ "mi kontentiĝas pri tio ĉi" Zamenhof skribis "mi kontentiĝas tion ĉi". Kaj nun fariĝas tendenco anstataŭigi prepozitivecon per akuzativo kaj pro tio ne estas tre facile distingi transitivajn verbojn de netransitivaj. Kvankam la esprimo "vin ne plaĉas" nun ankoraŭ iom pikas la orelojn kaj okulojn, tamen ĝi ne estas miskomprenbla, sekve akceptebla kaj eĉ povus populariĝi. Ĉu tio faros malbonon al la evoluo de la lingvo? Mi pensas, ke la tendenco de lingvouzo jam respondis tiun demandon. La oftega anstataŭigado de prepozitivo per akuzativo ne alportas miskomprenon aŭ malklarecon, sed ebligas al ni iomete mallongigi la frazon, sekve pli kaj pli vastiĝas kaj ĝeneraliĝas.

La diritaj fenomenoj montras al ni, ke la lingvaj logiko kaj reguloj ofte estas elastaj, sed ne rigidaj. Kial? Eble pro tio, ke la pensoj kaj sentoj, kiujn lingvo devas esprimi, estas tro komplikaj kaj subtilaj por toleri matematikan logikon kaj rigidajn regulojn. Se ni devas montri la transitivecon kaj netransitivecon de verboj en vortaroj por helpi la uzantojn de la lingvo, ni tamen ne povas limigi la uzadon per rigidaj reguloj ŝajne raciaj. La vivanta lingvo en la buŝo de la praktikantoj nature prenos la plej bonajn solvojn por esprimi tion, kion oni devas esprimi. Ne tiel gravas la nomoj kaj formoj, sed la esencoj, la klareco de senco kaj la simpleco de vortkombino, ĉu ne?

Ni revenu al la kunikloj. Ili plaĉas al siaj ĉinaj bredantoj per siaj fajna lano, delikata viando kaj fekaĵo-grajnoj, kiujn la kamparanoj aplikas al siaj kampoj anstataŭ kemian sterkon grundodifektan por ricevi abundan rikolton. Kredeble kunikloj interesos ankaŭ la venontajn generaciojn, kiuj devos pli multe zorgi pri la ekologio de la mondo. Verŝajne iam oni pli akre bezonos kaj akceptos la vorton "kuniklisto". Tion decidus kompreneble ne ni, sed la estontaj uzantoj de Esperanto. ■

Ĉiujare ĝi raportas sian laboron al IFEF kaj kontaktiĝas kun fervojistoj-esperantistoj de Germanio, Francio, Italio, Svedio, Aŭstralio, Britio, Usono kaj Pollando. Ili regule okazigas jar-kunsidon por interŝanĝi informojn. Iuj el ili verkas disertaĵon pri ĉina fervojo kaj kompilas fervojan Esperanto-vortaron.

La fondiĝo de la du E-asocioj markis, ke la praktiko de Esperanto en fakaj agadoj kaj la junulara E-movado de Ĉinio eniris novan etapon. La esperantistoj de la asocioj energie laboros por disvastigi Esperanton kaj plifortigi la amikecon kaj interkompreniĝon inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. ■

Kie kuŝas la tomboj de imperiestroj de Yuan-dinastio?

de WU WEN

SUR Ordos-stepo de la Interna Mongolio de Ĉinio estas grandioza palaco en tradicia tipa stilo de mongola arkitekturo. La ĉefa parto de la palaco konsistas el tri interkomunikigantaj haloj en formo de jurto. Meze de la ĉefhalo estas 5-metra statuo de sidanta Ĝingis-Ĥano en kasko kaj kiraso, kun glavo en mano. Sur la muroj estas freskoj pri montoj, riveroj, stepoj kaj ŝafaroj. Aprecante la freskojn oni sentas sin troviĝanta sur vasta stepo. La palaco estas nenio alia ol la maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano. Ĉiujare multaj venas tien por kulti lin.

SIMBOLA MAŬZOLEO

Ĝingis-Ĥano (1162-1227) estis fame konata persono en la monda historio, kaj ankaŭ heroo respektata kaj priflerata de mongoloj. Ĝingis-Ĥano, kies antaŭa nomo estis Temuĝin, unuigis ĉiujn tribojn sur la Mongola Altebenaĵo en 1206 kaj fondis la Mongolan Imperion. Li surtroniĝis kaj honoris sin per la titolo Ĝingis-Ĥano (spirito de lumo). Poste, li faris multajn militojn, kio multe influis eŭropajn kaj aziajn landojn. Lia nepo Kublajo (1215-1294) metis finon al la pli-ol-200-jara separatismo de Ĉinio

kaj fondis Yuan-dinastion (1271-1368).

Memore al Ĝingis-Ĥano, oni prenis liajn ok blankajn feltajn jurtojn kiel lian simbolan maŭzoleon kaj lokis ilin sur la Mongola Altebenaĵo (ĉe la nunaj montoj Altajo kaj Burhan Heledun). Poste, kiam la tribo Dalhute gardanta la maŭzoleon venis en Ordos-stepon, oni translokis tien la jurtojn. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la popola registaro konstruis la maŭzoleon en Yijinhualuo.

Se ĝi estas simbola maŭzoleo, nature sekvas la demando, kie oni entombigis Ĝingis-Ĥanon.

ENIGMO PRI TOMBOJ

La libro "Historio de Yuan-dinastio" diras, ke li estis entombigita en Qiniangu. Tie ripozis ankaŭ liaj posteuloj kaj aliaj imperiestroj de la dinastio. Sed la libro ne mencias la situon de la loko. Cirkulas diversaj diroj pri la situo. Iuj diris, ke ĝi estas en la Interna Mongolio de Ĉinio, aliaj opinias, ke ĝi estas en Mongolio, triaj asertis, ke ĝi estas en Fangshan-gubernio okcidente de Pekino. Aliaj fakuloj konstatis post esplorado, ke atakante la Okcidentan Ŝja-regnon, Ĝingis-Ĥano mortis pro malsano kaj es-

tis enterigita en Liupan-monto de Ningxia. La kaŭzo, ke ĝis nun oni ankoraŭ ne povas lokalizi la tombojn de Ĝingis-Ĥano kaj liaj posteuloj, kuŝas en tio, ke oni ne trovis surterajn kaj subterajn konstruaĵojn kaj termason de tomboj.

En la libro "Historiaj Verkoj" kompilita sub direktado de la persa politikisto kaj historiisto Rashid al-Din Fadl Allah (1247-1318) legiĝas detala priskribo pri la tombo de Ĝingis-Ĥano. Siatempe Rashid estis ĉefministro de Il-ĥanejo (unu el la kvar grandaj ĥanejoj fonditaj en la regiono konkerita de mongoloj). Li skribis en la libro, ke en Mongolio estas la monto Burhan Heledun. El ĝi elfluas pluraj riveroj borderitaj de sennombraj arboj. Tie sterniĝis vintra kaj somera paŝtejoj de Ĝingis-Ĥano, tial li intencis loki sian tombejon en la loko. Foje Ĝingis-Ĥano venis al iu loko por ĉasado. Tie kreskis sola arbo. Li deĉevaliĝis antaŭ la arbo kaj diris kun ĝojo: "La loko estas tre taŭga por mia tomboloko! Faru markon!" Laŭdire, en la jaro, kiam oni entombigis lin, tie elkreskis sennombraj arboj kaj herboj. Nun la lokon kovras densa arbaro ne trairebla, kaj la arbo kaj la tombo estas nerekoncible. Eĉ la tieaj maljunaj arbaristoj ne konas la vojon al la loko. Tuolei, la plej juna el la filoj de Ĝingis-Ĥano, kaj ankaŭ liaj filoj Mengge, Kublajo, Alibuge kaj aliaj posteuloj estas enterigitaj en la loko.

Se la diro estas kredinda, do Ĝingis-Ĥano kaj liaj posteuloj estis enterigitaj en la monto Burhan Heledun. Sed la libro konigas nur maldetalan situon: Fonto de pluraj riveroj. Kaj krome la tombo estis kovrita de arbaro kaj postrestis neniu marko. Tial la enigmo de la maŭzoleoj de imperiestroj de Yuan-dinastio embarasis la postajn historiistojn kaj arkeologojn.



La maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano

SEPULTADO DE MONGOLOJ

La entombigado de la imperiestroj de Yuan-dinastio tute malsamas ol tiu de aliaj dinastioj. Plejparto de la imperiestroj kaj reĝoj de la antikva Ĉinio ŝategis luksan entombigadon kaj maksimume zorgis pri la funebrado post sia morto. Por vivi diboĉan vivon ili konstruigis palacojn kaj ĝardenojn dum sia vivo kaj intencis vivi daŭre tian vivon post sia morto. Tiucele, ili konstruigis por si subterajn palacojn per sennombraj homoj. Tia estis la Unua Imperiestro (259-210 a.K.) de Qin-dinastio en la ĉina historio. Li konstruigis por si multajn palacojn. Li laborigis 700 000 homojn por konstrui la palacon Epang kaj saman nombron da personoj por konstrui sian maŭzoleon. La konstruado de la maŭzoleo daŭris 36 jarojn, de la sekva jaro post lia surtroniĝo ĝis lia morto. Kaj la konstruado de la maŭzoleo de imperiestro Wudi (156-87 a.K.) daŭris duonjarcenton.

Restis tre malmultaj maŭ-

zoleoj bone konservitaj kaj nepriŝtelitaj, ĉar multvaloraj juveloj en la tomboj ege tiklis ŝtelistojn. Ĉu la imperiestroj de Yuan-dinastio rimarkis la malagrablajn kaj alprenis tute alian rimedon? Verŝajne ne estas tiel. La malsameco de sepultado por la imperiestroj de Yuan-dinastio multe rilatas efektive kun la kutimo de la vivo de mongoloj.

En la frua periodo, kiel nomadoj la mongoloj migris de loko al loko. Iliaj jurtoj nomigis kiel moveblaj domoj. La jurtoj estis facile munteblaj. Ilia nomadismo simpligis la sepultadon. Tiam la mongoloj prenis surkampan sepultadon. La familianoj forlasis la mortinton surkampe aŭ veturigis la kadavron sur ĉaro, ĝis la kadavro falis teren, por ke bestoj kaj birdoj formangu ĝin. Ili kredis, ke tiam la animo de la mortinto iris sur la ĉielon. Se la kadavro restis neformangita dum kelke da tagoj, tio aŭguris malbonon. Por savi la animon oni devis okazigi liturgion. En agrikultura regiono oni fosis profun-

dan kavon kaj enterigis la kadavron. Poste oni plenigis la kavon kaj kompaktigis la teron per ĉevaloj. Tiele la tombo ne havis konusforman termason.

Nature, sepultado por imperiestroj kaj nobeloj estis luksa, kaj la maniero estis tre distingiga. Oni duonigis malmolan trunkon, kavigis ĝin laŭ grando de la kadavro kaj metis ĝin en la kavon. La du lignopecoj formis ĉer-

kon, oni lakis kaj ĉirkaŭligis ĝin trifoje per ora drato. Oni metis la ĉerkon en la tombofoson, plenigis ĝin per tero kaj lasis ĉevalojn tretadi sur la loko por kompaktigi la teron de la tombo. Poste oni buĉis kamelidon sur la tombo. La tombo estis gardata kaj aliro malpermesata. Kiam sur la tombo elkreskis herboj en la sekva printempo, oni ĉesigis gardadon. Se oni volis kulti la mortinton, oni venigis la kamelinon, ke ĝi konduku al la tombo, kie ĝia ido estis buĉita. Kiam ĝi trovis la lokon, ĝi blekadis de malĝojo. Laŭ tio oni rekonis la tombolon de imperiestro. Sed pli poste, kiam la maljuna kamelino mortis, la loko fariĝis nerekonbla.

Estas malfacile konstati, ĉu la supre diritaj notoj estas aŭtentikaj aŭ ne. En la feŭda Ĉinio imperiestroj estis la plej riĉaj. Arkeologoj dubas, ĉu ili vere akcentis malluksan vivon kaj tute forĵetis la tradician luksan sepultadon, kiun fakte la imperiestroj de ĉiuj aliaj dinastioj ŝategis. Sed tamen ĝis nun oni ne povas liberigi sin de la dubo; ĉar ili ne trovis veran tombon de imperiestroj de Yuan-dinastio. ■

Sur la stepo de Interna Mongolio

de GUAN LI

EN la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en la nordo de Ĉinio vivas la mongola popolo, unu el la nacimalplimulto de Ĉinio. Tie sterniĝas senlima stepo. Ĉi-sube mi rekomendu al vi itineron sur la stepo.

Vi povus enlandiĝi en Pekino kaj flugi de tie al Hohhot, la ĉefurbo de la regiono.

En la sekvanta tago mi akompanos vin en via aŭtoveturado. Post trihora veturado sur larĝa ŝoseo ni vidos la stepon, kie lokiĝas vico post vico da blankaj jurtoj. Tie estas nia celloko Siziwangqi, fiksa loĝpunkto de paŝtistoj.

Ni estos varme bonvenigataj de paŝtistoj. La mongoloj vivas en paŝta nomadismo. Ili ofte ŝanĝas siajn gresejojn, vagadas kaj malofte renkontas unu alian. Nun ili havas fiksan loĝejon, sed ili ankoraŭ estas gastamaj kiel antaŭe. Ili rigardas gastigon de foraj gastoj kiel grandan ĝojon. Per ĉevaloj ili portos vin en sian jurton kaj regalos vin per vino. La junulinoj en nacia freŝkolora kostumo kantas kanton, ĝis vi eltrinkos

la vinon. Kompreneble, ili ne devigos vin tion fari, se vi ne drinkas.

Vespere ni havos tre interesan kaj abundan manĝon. La gastamo kaj malafektemo de la mongoloj montriĝas ankaŭ en manĝado. Ĉe la manĝo oni regalos vin per bovlo da vino kaj prezentos al vi bakitajn ŝaf-femuraĵon kaj tutan ŝafon manĝatan per manŝirado. Antaŭ bakado la viando estas spicita per diversaj kondimentoj. La bonodoro tiklos al vi la nazon kaj urĝos vin nereteneble deŝiri grandan pecon da viando. Tiam vi tuj eksentos, ke vi kvazaŭ revenos en pratempon. La manĝadon akompanos kantado kaj dancado, kaj kiam la atmosfero atingos sian kulminon, la gastigantoj invitos vin danci kun ili.

La nokta stepo estas aparte ĉarma. La stelaro, la refreŝiga aero, ĉio ebriigos vin. Vi tranoktos en jurto. Kompreneble, la jurtoj por turistoj estas multe pli komfortaj ol tiuj de paŝtistoj. La jurtoj estas provizitaj per elektro kaj matraco. Eble vi ne alkitimiĝos al dormo sur la tero. Sed kiam vi komplete donos vin al la komforta "lito" kaj

rigardos tra la luko glimantajn stelojn, vi sentos vin brakumita de la naturo. Tian senton vi neniam havos en urbo.

En la sekvanta mateno, kiam vi eliros el via jurto, estos agrable al vi freŝa aero plena de la aromo de stepo. Tiu tago estos enhavoriĉa. Vi rigardos paŝtistajn luktadon, arkopafadon kaj rajdokonkurson. Ankaŭ vi povos fari arkopafadon kaj rajdadon sur ĉevalo aŭ kamelo. Guante la gajan distriĝadon, ne forgesu vin foti por memoro.

Probable vi ŝatos gastigi en paŝtista hejmo. En la jurto de paŝtistoj vi povos vidi freŝkolorajn murtapiŝetojn, malluksajn meblojn kaj foton de la tuta familio. La mastrino prezentos al vi buterteon. Promenante ekster la jurto, vi estos ravita de la senlima stepo punktita de gregoj da ŝafoj. En somero la herbejo fariĝos pli bela, ornamite de sovaĝaj floroj. Eble vi bedaŭros forlasi la stepon pro mallonga restado?

Nun ni diru "Ĝis revido" al la stepo kaj reveturu al Hohhot. Se permesos tempo, vi povos viziti antikvajn vidindejojn. Post tio vi forflugos al Kantono, kie vi ellandiĝos por hejmeniro. ■

(Daŭrigo de p. 23)

boatoj de mjaŭ-oj en Guizhou (Gujōu)-provinco de suda Ĉinio. La drakboato konsistas el tri lignaj boatoj. La boato en la mezo estas iom pli granda ol la flankaj. Dum la remado la boatoj tenas sin sufiĉe stabile. Antaŭ la konkurso la remistoj veturigas

siajn boatojn por viziti siajn parencojn kaj amikojn ambaŭborde de la rivero. La vilaĝanoj varme bonvenigas ilin kaj alte pendigas kokojn kaj anasojn sur la pruojn, dum la remistoj donas manĝaĵojn al la virinoj kaj infanoj. Cirkulas la diro, ke manĝinte la manĝaĵojn, oni estos feliĉa tra la

tuta jaro.

Dank' al la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj, la moro de drakboata konkurso jam enradikiĝis en Japanio, Koreio, Vjetnamio kaj aliaj landoj. De la lastaj jaroj, kiel amuza aktivado, drakboata konkurso altiras la atenton de ĉiam pli multaj remistoj de Eŭropo kaj Ameriko. ■

Rezultoj pri la Konkurso de Aeolus-Pokalo

POST la publikigo de la demandaro por la Konkurso de Aeolus-Pokalo en la n-ro 11 de EPĈ lastjare, ni ricevis respondojn de 117 legantoj el 28 landoj. Inter ili 102 respondis tute ĝuste. Iuj skribis al ni, ke ili interesiĝas pri la konkurso. Por ĝuste respondi ili foliumis preskaŭ ĉiujn numerojn de la gazeto de 1992. Ili trovis ne nur la respondojn, sed ankaŭ refoje tralegis la artikolojn. Pro tio ni multe dankas ilin kaj esperas, ke niaj legantoj daŭre donos al ni siajn proponojn kaj sugestojn en la estonteco.

Per lotumado ni elektis la premiitojn el la 102 legantoj. Jen ili estas:

La sola gajninto de la unua premio: Uladimiro Uasiljev (Ruslando)

La 10 gajnintoj de la dua premio:

Caio Carlos Cruz Ferreira Silva (Brazilo)

Sanches Krämer (Brazilo)
Sebastião Pereira Da Silva (Brazilo)

Gelma Oliveiva Rileiro (Brazilo)

Harry Olsson (Svedio)
Claude Pierroux (Belgio)

Ivic Ivana (Kroatio)
Andrzej Gielert (Pollando)
Edouard Schertzer (Francio)
Ĉeslovas Tručionis (Litovio)

Sinceran gratulon al tiuj 11 legantoj! La gajninto de la unua premio ricevos klozonan florzon kun la nomo Aeolus. Ĉiu el la gajnintoj de la dua premio ricevos unu aŭtomodelon faritan de la Aŭta Korporacio Aeolus de Ĉinio. Ĉiu respondanto (inkl. de la sukcesintoj) ricevos memorkoverton kaj memorkarton de la korporacio. Sur la koverto estas poŝtmarko kun la modelo de Aeolus-aŭto kiel la bildo.

Por kontentigi la legantojn ni refoje okazigos tian konkurson en n-ro 11 de la gazeto ĉi-jare. Ni esperas, ke pli multe da legantoj partoprenos en ĝi.

**Aŭta Korporacio
Aeolus de Ĉinio
Redakcio de
El Popola Ĉinio**

(Daŭrigo de p. 16)

aĝigantan, kiel saĝan konsilanton. Sed li forpasis! Forpasis, kiam la Esperanto-movado venis en novan jarcenton kaj devas batali pli energie kaj konkeri la mondon per pli vigla eldonado. Ni bezonas pli multajn talentajn verkistojn kaj tradukistojn por krei grandnombre verkojn beletrajn, sciencajn, gvidlibrojn por turismo, terminarojn por sciencoj kaj teknologioj, vortarojn, lernolibrojn por diversaj gradoj

de diversaj fakoj. Ni bezonas la modelon de prof. Juan Régulo Pérez por pli efike antaŭenpuŝi la movadon. Sed li forpasis!

Sed ja restas al ni lia spirito, la spirito de Stafeto. Se li ĝustatempe brave elpaŝis por daŭrigi la laboron de Literatura Mondo, nun elpaŝu novaj stafetoj por daŭrigi la laboron de Stafeto! Kaj por prosperigi la Esperantan eldonadon, necesas kunagado de la eldonistoj, verkistoj kaj legantoj. Sen manus-

kriptoj, neblas produkti librojn, kaj sen legantoj neblas daŭrigi la eldonadon. Jen vi vidas, ke ĉiu samideano povas ion fari por nia granda afero, por kiu nia bedaŭrata profesoro dediĉis sian tutan energion, sian tutan vivon. Por montri nian sinceran amon al li, al nia brava standardisto, ni ne lasu pereji la noblan spiriton de Stafeto kaj kunagu kun la spirito de Juan Régulo Pérez! Disfloru la spirito de Stafeto! Prosperu nia granda afero! ■

Plimalboniĝo de la ekologia medio jam fariĝis unu el la plej gravaj minacoj al la homa vivo. Kaj la tutmondaj popoloj, inkl. de la ĉina, alfrontas la komunan urĝan taskon — protekti la medion kaj zorgi pri la terglobo. Por tio nia revuo malfermis la rubrikon "Verdigo en Ĉinio", kiu ĉefe konigas, kiel iras forstumado, rezisto kontraŭ sablovento kaj grunda erozio, kaj medioprojektado en Ĉinio. Ni esperas, ke vi ŝatos ĝin.

La Red.

Verdigi Ĉinion

Teksto de FENG JIAPING*

Fotoj de LI SHUANDE

EN Ĉinio malmultas arbaraj riĉfontoj. Pro historiaj kaŭzoj arbaroj estis serioze detruitaj, la ekologia medio pli kaj pli malboniĝis, multaj lokoj estis serioze atakitaj de grunda erozio, oftaj trosekeco, inundo kaj ĉiam pli serioziĝinta sablovento. En iuj lokoj oni eĉ perdis la fundamentajn vivkondiĉojn. Vizaĝe al tiel serioza situacio Ĉinio kuraĝe batalis, projektis kaj starigis verdigajn konstruojn unu post alia. La ĉinoj ekbruligis la verdan esperon por la patrio per siaj propraj manoj.

PLIĜO DE ARBARIZITA AREO KAJ REZERVOKVANTO DE ARBOJ

Pliiĝo aŭ malpliĝo de arbaraj riĉfontoj markas prosperon aŭ malprosperon de la arbarkulturo. En la lastaj jaroj Ĉinio ĉiujare arbarizis ĉ. 5.3 milionojn da hektaroj da kampoj kaj ĉ. 4.7 milionojn da hektaroj da nudaj montoj. La plantitaj arbaroj jam kovris ĉ. 33.27 milionojn da hektaroj kaj okupas la unuan lokon en la mondo.

Samtempe kun tio, la ĉina re-

gistaro dediĉis grandan atenton al protektado kaj administrado de la arbaraj riĉfontoj. Ĝi pliigis la povon kontraŭ fajro kaj fiinsektoj kaj limigis la arbohakadon. Ĉio ĉi efike reduktis konsumon de la arbaraj riĉfontoj. Laŭ statistiko, en 1992 la arbara areo kreskis de 115 277 400 hektaroj al 130 933 300 hektaroj, la ligna rezervokvanto pliigis de 10.26 miliardoj da kubmetroj al 10.9 miliardoj da kubmetroj kaj la arbaroj kovris 13.63% de la lando, sed antaŭe nur 12%. Tiuj ciferoj

montras, ke la ĉina verdiga afero jam eniris en la novan etapon, en kiu la arbarizita areo kaj rezervokvanto de forstoj kreskas ĉiujare.

LA KVIN EKOLOGIAJ KONSTRUOJ

La kvin ekologiaj konstruoj estas plej atentataj en la ĉina forstumado.

La sistemo de la kampoŝirma forstozono kovranta nordokcidentan, nordan kaj nordorientan

Plantado de arboj sur nuda monto



Ĉinion (la Tri Nordoj en mallongigo) estas mondfama ekologia konstruo. Dum longa tempo tie granda kvanto da kampoj kaj herbejoj estis atakataj de sablovento kaj sekve la grena produktokvanto estis malalta. Por ŝanĝi la tiean ekologian medion, en 1978 la ĉina registaro decidis konstrui kampoŝirman forstozonon en la regiono. La konstruo kovras 551 guberniojn de 13 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, la totala areo de tiuj gubernioj estas 4 069 000 kvadrataj km, kiuj konsistigas 42.9% de la teritorio de Ĉinio. Laŭ la plano oni devas arbarizi 35 milionojn da hektaroj en 70 jaroj.

Pasis nur dekelkaj jaroj, en la regiono Tri Nordoj jam arbariziĝis 11.73 milionoj da hektaroj. Laŭ enketo, en la regiono 11 milionoj da hektaroj da kampoj estas protektataj de forsto-retoj, la grena produktokvanto kreskis je 10-30%, la produktokvanto de herboj — je pli ol 20%.

Konstruo de kampoŝirmaj forstoj en la meza kaj supra basenoj de Yangzi, la plej granda rivero en Ĉinio, komenciĝis en 1989. La konstruo daŭros 30-40 jarojn, en kiuj oni pliigos arbarizitan areon je 20 milionoj da hektaroj. Post plenumiĝo de la tasko la grunda erozio en la regiono estos fundamente katenita.

La konstruo de la ĉemara kampoŝirma forsto 18 000 km longa estis plenumita pli ol duone. En 195 gubernioj oni plantis forston longan je 12 000 km laŭ la marbordo, kun arbarizita areo de 6.6 milionoj da hektaroj. En iuj lokoj oni fundamentis sistemon de kampoŝirma forsto kun racie aranĝitaj arbospecioj kaj rimarkinda efiko. La urbo Zhanjiang (Ĝangĵang) kuŝas en Leizhou-duoninsulo ĉe la suda ekstremo de la ĉina kontinento, ĝi ofte suferis de ventego, sablovento kaj inundo, kelkfoje furioza tajfuno kiel sablod-

rako sin trudis tien kaj detruis domojn, ruinigis plantojn kaj multe damaĝis homojn kaj brutojn. En 1951-1980 la urbo 118-foje suferis de tropikaj ŝtormoj kaj tajfunoj, dekoj da miloj da domoj estis detruitaj. Nun la marborda kampoŝirma forstozono kiel fortika ekrano protektas la regionon. Finfine oni povas trankvile vivi kaj labori.

Sur la vasta landinterna ebenaĵo kampoŝirma forsto, la plej granda en la mondo, jam havas rudimentan formon. Laŭ la plano de la ĉina registaro, 915 ebenaĵaj gubernioj de la lando devas atingi la verdigajn normojn en la jaro 2000. En Henan-provinco, kies ebenaĵa areo estas la plej granda en Ĉinio, 94 gubernioj jam efektiviĝis verdigon. En la lastaj jaroj iuj eksterlandanoj venis al Henan. Kiam ili vidis senliman arbaron plantitan sur la ebenaĵo, kiu devus dezertiĝi laŭ ilia profetaĵo, ili laŭdis: "La ĉina popolo estas potenca en transformo de la naturo."

Grandioza forstumado en dezertoj de Ĉinio komenciĝis en 1991. Bone protektante la ekzistantajn forstojn kaj herbejojn, oni faras plantadon en diversaj manieroj, ekz. plantado de arboj, arbedoj kaj herboj kune, kultivo de arboj kaj herboj sur dezertaj lokoj, kaj aviada prisemado de la dezertoj. Oni planas verdigi dezerton kaj sablizan teron kun areo de 6.66 milionoj de hektaroj en la venontaj dek jaroj. Amasa sablojunga tajdo disvolviĝas tra la dezertaj regionoj.

La kvin ekologiaj konstruoj de Ĉinio kun areo de 5.78 milionoj da kvadrataj km kovras 60.2% de la ĉina teritorio. Ili ampleksas la ĉefajn alkalajn regionojn, kie estas seriozaj grunda erozio, sablovento kaj tajfuno. Plenumiĝo de tiuj konstruoj multe utilos al la homa vivo kaj la ekologia medio de Ĉinio.

45 "VERDAJ URBOJ"

En la lastaj jaroj Ĉinio faris grandan progreson en verdigo de la urboj. Laŭ statistiko, nun ĉiu ĉina urbano havas meznombre verdigitan areon de 3.9 kvadrataj metroj, je pli ol 60% pli multe ol tiu antaŭ dek jaroj. La verdigita areo de eternaj ĝardenoj atingis 474 600 hektarojn kaj tiu en la urboj leviĝis al 19.2%. Inter la pli ol 400 urboj de la lando 45 urboj, kies verdigita areo superis 30%, enviciĝis inter la "verdaj urboj".

Verdigi urbojn jam fariĝis grava konsistiga parto en urbo-konstruado de Ĉinio. Farante la totalan projekton de la urbo, oni prenis verdigon kiel ĉefan enhavon. Iuj gravaj turismaj urboj, malfermitaj marbordaj urboj kaj provincaj ĉefurboj estas avangardaj en tiu kampo. La 5 trunkaj ŝoseoj kondukantaj de Pekino al aliaj urboj jam fariĝis "verdaj koridoroj". La verdigita zono ekster Tianjin, tiu ĉe la antikvaj muroj de Xi'an kaj la "arbara urbo" de Changchun, ĉiu kun aparta stilo, jam fariĝis gravaj markoj de la ĉinaj urboj, kiuj iras al modernigo.


Ĉinio ja akiris rimarkindajn sukcesojn en forstumado kaj verdigo, tamen ĝi alfrontas ege penigajn taskojn. Nun la kvanto de arbara riĉfonto por ĉiu ĉino estas malalta, arbarizita areo estas malgranda kaj la plimalboniganta tendenco de la ekologia medio ne estas radikale ŝanĝita. En la lando ankoraŭ restas pli ol 100 milionoj da hektaroj da verdigeblaj nudaj montoj kaj dezertoj neverdigitaj, la areo de grunda erozio atingis 1.5 milionojn da kvadrataj km, en iuj lokoj seriozas sablizado kaj stepodegenerado. La ĉinaj forstokulturistoj penas por antaŭenpuŝi la forstumadon kaj verdigon al nova etapo en la 90-aj jaroj kaj bonvenigas la novan jarcenton per verdeco. ■

La aŭtoro estas oficisto de la Forstokultura Ministerio de Ĉinio.



Arboplantado

Foto de **SI GONG**



Kampoŝirma forsto sur la Leŭsa
Altebenajo

Ĉemara forsto

Foto de **YAN JIN**





Urbo verdigita



EKONOMIO

● Oni trovis olekampon meze de Tarimbaseno en Xinjiang de Ĉinio. La petrola tavolo dikas 42-98 metrojn kaj la totala rezervokvanto de petrolo superas 100 milionojn da tunoj. Fakuloj asertis, ke la regiono estas riĉa je petrolo kaj gaso, kaj la olekampo liveros pli abundan energion por la ekspluatado de la okcidento de Ĉinio.

● En 1992 la totala sumo de importaĵoj kaj eksportaĵoj de Ĉinio atingis 165.63 miliardojn da usonaj dolaroj, per tio Ĉinio okupis la 11-an lokon en la internacia komercado de la mondo.

● Februare de 1993 fondiĝis la Ĉina Aŭtomobila Kompanio Flxible (Limigita) kune investita je 30 milionoj da usonaj dolaroj de la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Urbaj Veturiloj sub la Konstrua Ministerio de Ĉinio, la Aŭtobusa Fabriko de Changzhou de Jiangsuprovinco kaj la Azia Aŭtomobila Teknologia Korporacio Flxible de Usono. La unuaj altnivelaj specimenoj jam estis elfaritaj.

La kompanio havas kompletan katalogon de aŭtobusoj, kiuj estos faritaj laŭ la plej alta normo de kvalito, funkcio kaj servo. Estas espereble, ke la teknologio de aŭtobuso de Ĉinio baldaŭ elturniĝos el postĝinteco kaj kreas bonan metodon por Ĉinio en atingo de monda nivelo de fabrikado de aŭtomobiloj.

● En 1992 Ĉinio starigis novan rekordon en la internacia komercado kun Latin-Amerikaj landoj. La totala sumo atingis 3 miliardojn da usonaj dolaroj. La sumo de importaĵoj de Ĉinio estis 1.9 miliardoj da usonaj dolaroj kaj tiu de eksportaĵoj — 1.1 miliardoj da usonaj dolaroj.

KULTURO

● En la pasintaj jaroj oni multe sukcesis en kolektado, prilaborado, surscenigo kaj esplorado pri “Dek Du Mukam-oj” konata kiel gemo de orienta muziko.

“Dek Du Mukam-oj” estas muzika verko kreita de la ujugura popolo dum mil jaroj. Ĝi estas grandtipa klasika melodia serio el muziko, kanto, danco kaj literaturo. Ĝi estas rara en la muzika kulturo de la Oriento kaj eĉ de

la tuta mondo. Ĝi multe influis la kulturon de la meza regiono de Ĉinio, la Okcidenta Azio, Centra Azio kaj multaj arabaj landoj.

● Inaŭguriĝis lastatempe en Ŝanhajo Muzeo de Popolaj Kolektoj en iu antikva domo. Tie oni eksponis antikvajn skatolojn, monerojn, papiliojn, ŝlosilojn, genealogiojn, horloĝojn, teatrajn kostumojn, agatojn, ventumilojn, maskojn de roloj en la pekina opero, manĝbastonetojn, insignojn kun portretoj, serurojn, skribilarojn, bamburadikajn skulptaĵojn, miniaturajn skulptaĵojn, fotojn de filmsteloj, miniaturajn muzikajn instrumentojn, alumetojn, malnovajn fotilojn kaj multajn diversajojn. La montritaj 11 000 objektoj de 130 specoj altiris multe da vizitantoj.



La pitoreskejo Jiuzhaigou

● Antaŭ nelonge la Komisiono de Mondaj Heredaĵoj de Unesko decidis enlistigi en la katalogon de la mondaj heredaĵoj la tri ĉinajn pitoreskejojn Wulingyuan (en Hunan-provinco), Jiuzhaigou (Ĝiŭĝajgoŭ) kaj Huanglong (ambaŭ en Sichuan-provinco). Do, ĝis nun jam dek lokoj de Ĉinio estis enlistigitaj en la katalogon. La antaŭaj sep estas la Imperiestra Palaco en Pekino, la Ruino de Restadejo de Prahomoj en Zhoukoudian proksime de Pekino, la Granda Muro, la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qindinastio, la Ŝtonkavernaro Mogao en Dunhuang, Huangshan-monto kaj Taishan-monto.

● En la 43-a Berlina Internacia Filma Festivalo la ĉina filmo “Virinoj de la Aroma Lago” reĝisorita de la fama ĉina reĝisoro s-ro Xie Fei (Ŝje Fej) kaj la ĉina Taiwan-a filmo “Nupta Bankedo” kune gajnis la medalon Ora Urso.

La filmo “Virinoj de la Aroma Lago” ludita

de la fama ĉina aktorino Siqin Gaowa akuzas la tradician ideologion, kiu damaĝas la virinojn, kaj elmetas la demandon pri emancipiĝo de virinoj.

MEDICINO

● La Pekina Tibet-medicina Hospitalo fondita de la Ĉina Tibetologia Centro kaj la Tibet-medicina Hospitalo de Shannan-regiono en Tibeto jam komencis sian servon.

La hospitalo situas en la norda parto de Pekino. En la hospitalo estas fakoj de internaj malsanoj, kirurgio kaj ostovundo. Tie laboras 6 spertaj tibet-medicinaj kuracistoj venintaj el Tibeto. Nun en Pekino estas 2 400 konstante loĝantaj tibetanoj kaj 4 000 pasloĝantaj tibetanoj. La hospitalo servas ne nur al tiu homgrupo, sed ankaŭ al la publiko kaj alilandanoj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La unua ĉina eksperimenta inĝenierajo nomata senhoma fabriko trapasis ekspertizon de la Ŝtata Scienca kaj Teknika Komisiono de Ĉinio post kvinjara provado en Qinghua (Ĉinghŭa)-universitato.

La eksperimenta inĝenierajo de senhoma fabriko estas komputera integra fabriksistemo. Ĝi montras direkton de la disvolviĝo de aŭtomatigo de fabrikoj. Tiu inĝenierajo plenumis esploradon de 46 kompletigaj temoj kaj efektivigis ĝeneralan kompletigadon de la sistemo, kio atingis la mondan nivelon.

● Ĉina laboristino Wang Lianxiang (Ŭang Ljanŝjang) inventis altenergian koloidan baterion kaj gajnis tri internaciajn orajn medalojn. Invento de tiu novtipa pilo solvis la problemon de tralikiĝo ofte okazanta ĉe la vaste uzata plum-bata akumulatoro, kiu facile damaĝas la sanon de homoj, korodas ekipaĵojn kaj poluas la medion.

ARKEOLOGIO

● Sur rokmuroj de tri kavernoj en Yabulai-monto en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio oni trovis manformajn desegnojn faritajn antaŭ tridek mil jaroj.

La desegnoj estas ruĝaj kaj nigraj. Prahomoj metis manon sur rokon kaj blovis tra birda osto aŭ tuboforma objekto okran pulvoron sur man-

dorson. Specialistoj konstatis, ke la manformaj desegnoj en Yabulai-monto estis verko de prauloj de la posta periodo de paleolitiko (330-150 jc. a.K.). La trovo longigis la historion de la ĉina belarto je 20 000 jaroj.



La ŝtongravurita fiŝo

● Reaperis ŝtongravurita fiŝo sur roko ĉe Baiheliang-klifo en Yangzi-rivero. Ĝi estas ŝtatnivela protektata antikvaĵo. La fiŝo 1.5 metrojn longa notis la akvonivelejn de Yangzi-rivero en 72 akvomalabundaj jaroj en la pasintaj pli ol 1 000 jaroj. Baiheliang situas en Yangzi-rivero en Fuling de Sichuan-provinco. Ekde Tang-dinastio literatoroj kaj hidrogeologoj gŝavuris sur la klifo multe da poemoj kaj ankaŭ 14 fiŝojn. Tiuj gravuraĵoj sin kaŝis sub akvo pli ol mil jarojn kaj estas ankoraŭ klare vedeblaj.

MEDIOPROTEKTADO

● Internacia kunlabora esplorado pri eko-logia inĝenierio de ellaso de salmoj sukcesis en la salmoesploro en la Nordoriento de Ĉinio. Oni jam trairebligis la revenojn por salmoj, kaj la arte elkovitaj salmoj povas naĝi de Suifen-rivero en maron kaj la maturaj salmoj povas reveni al la naskiĝloko.

La viando de salmo estas tre delikata, bona kaj nutroriĉa. En aŭtuno la maturiĝintaj salmoj naĝas de la Japana Maro en Heilong-, Wusuli- kaj Suifen-riverojn kaj tie demetas frajon. En la sekvanta printempo la salmidoj forlasas la riverojn kaj naĝas en la maron. Ili revenas en la riverojn post maturiĝo. Pro senbrida kaptado de salmoj en la lastaj jaroj la fiŝoj alfrontas danĝeron de pere.

NOVA SITUACIO EN LA REFORMADO DE ĈINIO

Dank' al praktiko de la politiko pri reformado kaj pordmalfermo, en la lastaj 14 jaroj aperis tute nova situacio en Ĉinio. Ekde 1980, sinsekve fondiĝis specialaj ekonomiaj distriktoj en Shenzhen, Zhuhai, Shantou kaj Xiamen (Ŝjamen), suda Ĉinio, kun totala areo de ĉ. 813 kvadrataj kilometroj. En aprilo de 1988 naskiĝis la Hainan-a Speciala Ekonomia Distrikto kun areo de 34 000 kvadrataj kilometroj. En 1991 la industria produktovaloro de la 5 supre menciitaj distriktoj jam atingis 54.03 miliardojn da juanoj, kaj ilia eksporta valoro estis 6.578 miliardoj da usonaj dolaroj, oni fakte uzis jam 6.848 miliardojn da usonaj dolaroj investitajn de eksterlandanoj.

Estas tre atentataj la ĉemaraj malfermitaj urboj kaj ĉemaraj ekonomiaj ekspluataj regionoj. Printempe de 1984, la ŝtato decidis fari jenajn 14 ĉemarajn urbojn malfermitaj. Ili estas Tianjin (Tjanĝin), Ŝanhajo, Dalian, Qinhuangdao (Ĉinhuangdaŭ), Qingdao (Ĉingdaŭ), Yantai, Lianyungang (Ljanjungang), Nantong, Ningbo, Wenzhou, Fuzhou, Kantono, Zhanjiang (Ĝangĝang) kaj Beihai.

La ekonomiaj ekspluataj regionoj kovras pli kaj pli vastan areon. Post 1985, la ŝtato decidis fari ekonomiaj ekspluataj regionoj la delton de Yangzrivero, tiun de Perlo-rivero, la triangulan lokon de Xiamen, Zhangzhou kaj Quanzhou (Ĉjuaŝŝoŭ) en suda Fujian (Fuĝjan)-provinco, Liaodongduoninsulon, Jiaodong (Ĝjaŭdong)-duoninsulon kaj la regionon ĉe Bohai-golfo, kiuj ampleksas entute 293 urbojn kaj guberniojn.

Malfermitaj urboj nun troviĝas ne nur ĉe la marbordo, sed ankaŭ en la landinterno. Aprile de 1990, la ŝtato publikigis, ke ĝi malfermos kaj ekspluatos Pudong-distrikton de Ŝanhajo por akceli la ekonomian disvolviĝon de la baseno de Yangzrivero. En 1992 kvin gravaj urboj Wuhu, Jiujiang (Ĝiŭĝjang), Wuhan, Yueyang (Jŭejang) kaj Chongqing (Ĉongĉing) ĉe Yangzrivero fariĝis malfermitaj urboj.

Junie de 1992 malfermiĝis 13 landlimaj urboj kaj gubernioj en nordorienta, nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio: Heihe kaj Suifenhe de Heilongjiang (Hejlongĝiang)-provinco; Hunchun de Jilin (Ĝjilin)-provinco; Manzhouli kaj Erenhot de Interna Mongolio; Yining, Tacheng kaj Bole de la Xinjiang (Singĝjang)-Ujgura Aŭtonoma Regiono; Pingxiang (Pingŝjang) kaj Dongxing (Dongŝing) de la Guangxi (Ĝuangŝji)-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono; Hekou, Wanding kaj Ruili de Yunnan-provinco. Cetere, la ĉefurboj de la 6 provincoj kaj

aŭtonomaj regionoj ĝuas favorajn politikojn praktikatajn de la ĉemaraj malfermitaj urboj.

Rilate la investadon de eksterlandanoj, la ŝtato decidis, ke ĉiuj provincaj ĉefurboj rajtas ĝui la politikojn praktikatajn de la ĉemaraj malfermitaj urboj. Koncerne la grandskalajn investojn kaj alt-teknikajn konstruojn, ili ĉiuj rajtas ĝui la favorajn politikojn praktikatajn de la ekonomiaj ekspluataj regionoj, nur se ili estas konformaj al la ŝtata industria regularo kaj sankciitaj de la registaro.

Aŭguste de 1992, aliaj 11 provincaj ĉefurboj de Ĉinio ekhavis rajton ĝui politikojn praktikatajn de la malfermitaj urboj laŭ la decido de la Ŝtata Konsilantaro. Tio signifas ke fundamente formiĝis la nova situacio de ĉioampleksa reformado kaj pordmalfermo en Ĉinio.

MALKRESKAS LA LOĜANTARO DE ŜANHAJO

En 1991 malkreskis la loĝantaro de la urbaj kvartaloj de Ŝanhajo, la plej granda urbo en Ĉinio. En la unua duonjaro de 1992, tio okazis en la tuta urbo, pli frue ol en la tuta lando je 50 jaroj.

Laŭ statistiko en 1991, en Ŝanhajo naskiĝis sume 100 781 homoj, kaj mortis 85 624 loĝantoj, alivorte, la loĝantaro kreskis je 15 157 tiujare, la naskokvanto estis 7.84% kaj la natura kresko de loĝantaro estis 1.18%, tial 1991 estis jaro, kiam la loĝantaro kreskis plej malrapide de post 1949, kiam naskiĝis la nova Ĉinio. Tiujare, la natura kresko en la urbaj kvartaloj, kies loĝantaro konsistigas 61% de la tuta urbo, estis -0.07%. Laŭ statistiko farita de la Ŝanhaja Naskolimiga Komisiono, en la unua duonjaro de 1992, en Ŝanhajo estis 38 716 novnaskitoj, dum la mortintoj estis 426 236, kaj la natura kresko de la loĝantaro estis -0.58%. Kalkulante laŭ tiu procento, oni konkludis, ke en 1992, en Ŝanhajo naskiĝis entute 96 700 beboj, je 3 900 pli malmulte ol tiu fiksita en la plano, kaj la natura kresko estis 0.5%. Oni kalkulas, ke de post 1993, la loĝantaro de la urbo malkreskos.

Fakuloj opinias, ke la malkresko de la loĝantaro en Ŝanhajo estas granda sukceso, dank'al persista praktiko de la naskolimiga politiko en la pasintaj 20-30 jaroj. Tio montras, ke oni fundamente solvis la problemon pri rapida kresko de la loĝantaro de Ŝanhajo. Antaŭ 1949, tie la naskokvanto estis granda kaj loĝantara kresko malgranda. En la 50-aj jaroj la naskokvanto estis granda, mortokvanto malgranda kaj loĝantara kresko rapida. Nun la situacio tute ŝanĝiĝis, la naskokvanto, mortokvanto kaj loĝantara kresko ĉiuj estas malgrandaj. Tio markis, ke Ŝanhajo jam atingis la nivelon de la evoluintaj landoj.



La Pekina Komisiono por Peti Gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000 prezentis sian peticion al la Internacia Olimpika Komitato decembre de 1991. Ekde tiam la urbo Pekino suriris malfacilan vojon por atingi sian celon. Tio enkorpigis la olimpikan spiriton de partopreno. Por la peto ne estas malgajninto, sed nur unu favorato. Tio vekis atenton ĉe niaj multaj legantoj. Por kontentigi ilin nia revuo publikigos artikolojn por konigi la trajtojn de Pekino, unu el la urboj, kiuj petas gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000.

Sube estas intervjuo de s-ino Zhang Qingzhen, raportistino de nia revuo, al s-ro He Zhenliang, vicdirektoro de Komisiono pri Fizikkulturo kaj Sportoj de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato.

La Red.

Espero kaj malfacilo estas kune

— Intervjuo al s-ro He Zhenliang

de ZHANG QINGZHEN

Raportisto: Bonvolu diri al mi, kion Pekino jam faris por sukcesigi sian peton gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000.

He Zhenliang: En 1992 Pekino faris ĉiuf flankan preparadon por peti gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000. Unue la Pekina Komisiono por Peti Gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000 faris peticion kun 200 mil ideogramoj, kies enhavo ampleksas la politikon, ekonomion, kulturon kaj edukon de la tuta lando kaj ankaŭ historiajn vidindejojn, trafikon, turismon, municipajn konstruaĵojn, sportejoj, median protekton kaj meteorologiajn aferojn de Pekino.

Laŭ sia laborplano de la peticio Pekino komencis sian urban konstruadon. Oni forigis la semaforojn por la Dua Urba Rondŝoseo, 33 km longa. La aŭtovojo de la Ĉefurba Flughaveno al la urbaj kvartaloj estas en streĉa konstruado. Ĉi-jare estos finkonstruitaj la nova Pekina Stacidomo, subtera fervojo kaj la Or-



S-ro He Zhenliang

ienta Tria Urba Rondŝoseo. La Internacia Olimpika Komitato emfazis, ke por decidi la olimpikan gastiganton, ĝi konsideras ankaŭ pri la media protektado kaj ekologia ekvilibro de la koncerna urbo. En la urba konstruado Pekino dediĉis grandan atenton ankaŭ al tiu problemo.

La pekina komisiono diversmaniere diskonigis la olimpikajn

celon kaj spiriton. Nun ĝi ricevis donacon de 2 900 personoj. En Pekino kaj iuj aliaj lokoj oni okazigis konkursojn pri scioj de la olimpiaj ludoj kaj fremdlingvan oratoradon. La komisiono ricevis milojn da telegramoj, leteroj kaj tukoĵ kun subskribo. Ĉio ĉi montris, ke la tuta ĉina popolo unanime aprobas, ke Pekino petas gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000.

R: Ĉu la pekina komisiono klopodas por havi subtenon ankaŭ eksterlande?

He: Jes. La laborprincipo de la pekina komisiono estas "kun multaj amikiĝi, multe labori por bone koni unu alian kaj gajni aprobantojn". Por ke la tuta mondo vere komprenu, kial Pekino volas gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000, bone konu Ĉinion kaj la sinceran deziron de la 1.1 miliardoj da ĉinoj en tiu kampo, en 1992 la ĉina sporta delegacio partoprenis la Vintrajn Olimpiajn Ludojn en Francio kaj Someraĵn Olimpiajn Ludojn en

Barcelono, delegitoj de la pekina komisiono partoprenis ankaŭ la kunvenon de la Plenuma Komitato de la Internacia Olimpika Komitato okazintan en Meksikio kaj la ĝeneralan kongreson de diversalantaj olimpikaj komitatoj, tie ili vaste konigis la kondiĉojn de Pekino por gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000 kaj montris la fortan deziron de la ĉina popolo. En la Monda Foiro okazigita en Seviljo, Hispanio, vidigis ekspoziciejo de la pekina komisiono en la halo por Ĉinio. Milionoj da popolanoj vizitis ĝin.

En 1992 Pekino akceptis 30 membrojn de la Internacia Olimpika Komitato kaj 15 prezidantojn aŭ ĝeneralajn sekretariojn de internaciaj sportaj organizaĵoj de apartaj branĉoj. "Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj." Iu membro de la Internacia Olimpika Komitato vizitis Pekinon antaŭ 8 jaroj, sed ĉi-foje li diris, ke vere multe ŝanĝiĝis la urbo, ĝi fariĝis moderna urbo. Iuj ĝiaj membroj antaŭe opiniis, ke gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000 estas nur bona deziro de Ĉinio. Ili dubis pri la necesaj kondiĉoj por okazigi olimpikojn en Pekino, sed la ĉi-foja vizito forigis ilian dubon.

R: Por gastigi la olimpikojn oni devas elspezi tre multe. Ĉu Ĉinio bone preparis sin por tio?

He: La pekina komisiono antaŭkalkulis, ke por la olimpikoj en 2000 oni bezonas 1 020 milionojn da usonaj dolaroj, tamen Pekino, unu el la plej rapide disvolviĝantaj urboj en la ekonomio, fiere deklaras, ke por la olimpikoj en 2000 ĝi havas sufiĉan monon kaj eble ian reston.

La komisiono diris, ke se la Internacia Olimpika Komitato ne havas aliajn difinojn, kiam la olimpikoj okazos en Pekino, ĝi volonte pagos por la oficiale registritaj membroj de la delegacioj la veturon, pasloĝon kaj manĝadon kaj oportunistojn la

trejnadon de la delegacioj de la disvolviĝantaj landoj, se ili deziras.

R: Kiel vi opinias, ĉu Pekino sukcesos?

He: Laŭ mi, estas granda ebleco por ĝia sukceso. Kompreneble en tio estas ankaŭ malfacilo. Nun neniu povas konkludi, kiu gajnos. La 7 peticiitaj urboj havas ĉiu sian superecon, tial iuj membroj de la Internacia Olimpika Komitato diris, ke tio estas konkurso inter potenculoj.

Kompreneble, Pekino havas sian superecon, kiu mankas al aliaj urboj. Ĉinio havas historion de 5 000 jaroj kaj longan kultur-an tradicion. En la tuta lando, ĉu la ŝtataj gvidantoj ĉu la ordinaraĵoj, senescepte subtenas Pekinon en ĝia peto gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000. En 1990 Pekino sukcese okazigis la Azian Sportkunvenon, en tio montriĝis ĝia eminenta kapablo. Nun Ĉinio profundigas sian reformadon kaj pordomalfermon. En Ĉinio la socio estas stabila, ekonomio kreskas rapide kaj ĝia influo sur la tuta mondo estas pli kaj pli granda. Nun Ĉinio kun la plej granda loĝantaro petas gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000, tio forte akcelos disvastigon de la olimpika idealo tra la tuta mondo.

R: Kiel vicprezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, vi plurfoje partoprenis la balotadon pri la gastiganteco de la olimpiaj ludoj. Kion vi atendas de la ĉi-foja balotado, kiam Pekino enviciĝis inter la petantoj?

He: Mi estis elektita kiel membro de la Internacia Olimpika Komitato en 1981. Mi partoprenis 5-foje la balotadon pri la gastiganteco de la olimpiaj ludoj, inkl. de tiuj de la Someraj kaj Vintraj Olimpikoj en 1992, kaj ĉiufoje mi funkciis kiel kontrolanto. Ĉi-foje Ĉinio enviciĝis in-

ter la petantoj, por diri sincere, ĉiufoje, kiam alproksimiĝas la tago de balotado, mia koro forte batas. Tio estas ekscita kaj maltrankviliga tago. Kiel reprezentanto de la petanta urbo, mi estas malpacienca. Mi volas pli frue scii la rezulton de la balotado kaj timas pri nia malsukceso.

Nun ni faras ĉion eblan, por ke la 23-an de septembro, kiam s-ro J. A. Samaranch malfermos la koverton, li deklaru, ke la Olimpiaj Ludoj en 2000 okazos en Pekino.

R: Oni diris, ke Taŝkent jam eltiris sin el la vico de la petantaj urboj kaj iuj el ili havas tian aŭ alian problemon, dum aliaj petantoj energie trumpetas pri sia potenco, kiel vi taksas la nunan situacion?

He: Spite ĉion ĉi, nia firmeco estas neŝancelebla. Ni senlace konigos al la tuta mondo niajn bonajn kondiĉojn, la sincerecon kaj fortan deziron de la ĉina popolo por la olimpikoj.

La jaro 2000 ligiĝas kun la du jarcentoj. La 27-aj Olimpiaj Ludoj ĉe la komenco de la nova jarcento havos apartajn signifojn, se ili okazos en Pekino. Se ni rigardas la petadon kiel longan veturon, nun ni troviĝas en la vico de antaŭkurantoj. Tamen ni devas neniom malstreĉi nian penadon por la unua atingi la celon ĉe la fino.

R: Kion Pekino faros antaŭ la 23-a de septembro?

He: Unue ni faros pli vastan kontakton kun la ekstera mondo kaj due plifortigos nian propagandon.

Ni faros nian penadon, por ke pli ol 60 membroj de la Internacia Olimpika Komitato vizitu nian urbon. Antaŭe ni neglektis la propagandon, en la estonteco ni devos pli energie fari ĝin. Mi devas diri, ke ju pli bone ni faros nian laboron en nia lando, des pli granda estos la ebleco por nia sukceso.

R: Dankon!



Renkonte al nova epoko de vid-telefona komunikado

— Pri la vid-telefono “Hopestar” (Stelo de Espero)



Vid-al-vida interparolo pere de vid-telefono

EN la nuna informa socio telefono estas nemankigebla komunikilo kaj interligas la homojn de la urboj ĝis la vilaĝoj, de la eosta hemisfero ĝis la uesta.

Tamen al la nuna telefono ankoraŭ mankas la funkcio vidigi la interparolantojn. Telefonante, vi povas nur aŭdi vian alvokaton, sed ne vidi

lin. Jam de multaj jaroj oni revas, ĉu eblas produkti vid-telefonon.

La respondo estas jesa, kaj la revo jam realiĝis. Ni ĝoju kaj festu la aperon de vid-telefono! Uzante tian telefonon, vi povas vidi la alvokaton, kvazaŭ vi parolus kun li vid-al-vide, kiel ajn malproksime li troviĝas. Dank' al la vid-telefono, la mondo fariĝis kvazaŭ malgranda.

Nuntempe nur Ĉinio, Usono, Japanio kaj malmultaj aliaj landoj kapablas produkti vid-telefonon. Ĉinio jam pogrande produktas vid-telefonon kun la marko “Hopestar” (Stelo de Espero) kaj pretas servi al klientoj tra la tuta mondo.

Kara leganto, ĉu vi imagis, ke la vid-telefono kun la marko “Hopestar” ne estas elpensita de ordinara homo, sed estas kristali-

ĝo de kolektiva saĝo sub la gvido de iu esperantisto. Li estas prof. Dai Liming, ĝenerala direktoro de la korporacio de Sciencaj kaj Teknikaj Entreprenoj, kies emblemo estas verda stelo.

Ni esperantistoj fieras pri la sukceso de samideano Dai Liming kaj sentas apartan intimecon al la vid-telefono "Hopestar".

La vid-telefono kun la marko "Hopestar" atingis la internacian avangardan nivelon kaj distingiĝas per multaj avantaĝoj kompare kun aliaj samspecaj vid-telefonoj. La bildo de "Hopestar" estas pli klara, kaj la prezo malpli alta. Ĝi estas malgranda kaj facile portebla. Estas tre facile ellerni ĝin munti kaj manipuli. La nomita korporacio vendas la vid-telefonon kun trijara garantio.

La vid-telefono "Hopestar" havas ankaŭ telefaksan funkcion. Nur kelkaj sekundoj sufiĉas por telefaksi mesaĝon. Ĝuste pro tio la vid-telefono "Hopestar" estas tre bona en la nuna informa epoko.

Ĝi utilas por:

Vid-al-vidaj telefonaj interparoloj;

Interŝanĝo de informoj kaj transsendo de kontraktoj, mendiloj, katalogoj, specimenoj kaj bildoj samtempe per video kaj fakso;

Longdistanca transsendo de diversaj legitimiloj, fotoj, fingraj haŭtlinioj, mapoj kaj ĉelokaj komandaj topografiaj planoj;

Longdistanca observado kaj gvido de produktado de diversaj entreprenoj;

Superrigardo kaj direktado de la movado de fervojoj, ŝoseoj, havenoj kaj flughavenoj;

Longdistanca kaj ĝustatempa transsendo de meteologiaj mapoj kaj hidrologiaj kaj akvomastrumaj materialoj;

Longdistanca transsendo de iksradiaj fotografiaj kaj diagnozo;

Komunikado inter malsanuloj, surdmutuloj kaj aliaj handikapuloj;

Longdistanca observado de fajropreventado de petrol-putoj kaj arbaroj.

La vid-telefono "Hopestar" estas produkto de la Korporacio de Sciencaj kaj Teknikaj Entreprenoj "Hopestar" de la urbo Zhuhai, suda Ĉinio. Tre bonvenas investo kaj kunlaboro de bankieroj kaj entreprenistoj tra la mondo. La vid-telefono "Hopestar" estos montrata dum la 78-a Universala Kongreso de Esperanto en julio ĉi-jare en la marborda urbo Valencio de Hispanio. "Hopestar" bezonas subtenon de diverslandaj samideanoj por sin diskonigi kaj servi al klientoj de la mondo. Ĝia produktanto prof. Dai Liming, en la nomo de verda stelo, salutas kaj dankas la esperantistojn en ĉiuj mondpartoj. Li esperas, ke fervoraj esperantistoj helpos serĉi partnerojn por kuna produktado kaj perantojn por starigi vend-retojn. Interesitoj bonvolu kontaktigi rekte kun prof. Dai Liming kaj lia korporacio.

Adreso: Huasheng Gongyecun, Wanzai, CN-519030 Zhuhai, Guangdong, Ĉinio

Telefono: (0756)822132, 822415


Aŭtomata responda terminalo de la vid-telefono: (0756)822416

Telefakso: (0756)822421, 821148, 821541

Tuŝ-komputileto por infanoj




Komputila vid-telefono kaj ĝia faksimilo





Prof. Dai Liming konigas komputilon manipulitan per tuŝo de kaj skribo sur ekrano.

Vid-telefono kaj ĝia regilo



Renkonte al nova epoko de vid-telefona komunikado

— Pri la vid-telefono "Hopestar" (Stelo de Espero)



Regiloj de vid-telefono

Serio da vid-telefonoj kaj aliaj produktoj de la korporacio eksponataj en Pekino

